


EL POPOLA ĈINIO

12
1973





Gejunuloj de nacimalplimulto en parko



Prezidanto Maŭ manpremas kun Prezidanto Pompidou.

Prezidanto Maŭ Zedong intervidiĝis kun Prezidanto Georges Pompidou



Prezidanto Maŭ interparolas kun Prezidanto Pompidou.

Prezidanto Maŭ Zedong intervidiĝis kun Georges Pompidou, prezidento de la Franca Respubliko, posttagmeze de la 12-a de septembro. Ili vaste interŝanĝis opiniojn pri demandoj de komuna zorgo en senĝena atmosfero.

Jean de Lipkowski, ŝtata sekretario por la Ministerio de Eksteraj Aferoj de Francio, ĉeestis la intervidiĝon.

Kiam la honorindaj gastoj, en akompano de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj, alvenis al la loĝejo de Prezidanto Maŭ, ili estis salutataj de Viceprezidanto Vang Hongven ĉe la enirejo.

Prezidanto Maŭ kaj Prezidanto Pompidou longe manpremis je la renkontiĝo. Prezidanto Maŭ esprimis varman bonvenigon al Prezidanto Pompidou por lia vizito al Ĉinio. Prezidanto Pompidou diris: "Estas granda honoro por mi povi renkonti vin, kiu ŝanĝis la vizaĝon de la mondo." Li diris al Prezidanto Maŭ pri la volo, kiun Generalo de Gaulle havis dum sia vivo, intervidiĝi kun li. Poste en la interparolado Prezidanto Maŭ diris je retrorigardo, ke antaŭ dek jaroj, dank' al la

klopodoj de Generalo de Gaulle, Francio la unua el la landoj de Okcidenta Eŭropo starigis plenajn diplomaciajn rilatojn kun Ĉinio. Prezidanto Maŭ petis Prezidanton Pompidou, ke li transdonu post sia reveno al Francio liajn salutojn al ĉiuj francaj amikoj renkontitaj de li.

La intervidiĝon ĉeestis ankaŭ Vang Hajĵong, Tang Venŝeng, Ki Zonghua kaj Luo Hju.



Prezidanto Maŭ intervidiĝas kun Prezidanto Pompidou.

Prezidanto Pompidou Vizitis Ĉinion

Laŭ la invito de Dong Bivu, aganta prezidento de la Ĉina Popola Respubliko, kaj Ĝou Enlaj, ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, Georges Pompidou, prezidento de la Franca Respubliko, faris oficialan viziton al la Ĉina Popola Respubliko de la 11-a ĝis la 17-a de septembro, 1973. Prezidanton Pompidou akompanis en la vizito Michel Jobert, ministro de eksteraj aferoj, kaj aliaj.

La prezidento de la Franca Respubliko kaj lia sekvantaro vizitis Pekinon, Datong, Hangĝou kaj Ŝanhajon kaj havigis al si ŝancojn kontakti ĉinajn popolanojn kaj rekte informiĝi pri la disvolviĝa stato de la ekonomio, socio kaj kulturo de Ĉinio. Ĉie kien ili iris ili estis varme bonvenigataj kaj amike akceptataj de la ĉinaj registaro kaj popolo.

Tiu ĉi estas la unua oficiala vizito de franca ŝtatestro al Ĉinio. Tial ĝi signis ke la rilato inter la du landoj eniris novan gravan stadion.

La rilato starigita inter Ĉinio kaj Francio laŭ la propono de Prezidanto Maŭ Zedong kaj Generalo de Gaulle en 1964 senĉese glate disvolviĝas. Tia disvolviĝo konformas al la interesoj de ambaŭ landoj kaj estas pozitiva kontribuo al la paca afero kaj pliboniĝo de la internacia interrilato.

La registaroj de Ĉinio kaj Francio havas komunan volon plifortigi la amikecon inter la popoloj de la du landoj kaj disvolvi la rilatojn inter ili. Kvankam malsamaj estas la sociaj sistemoj de ambaŭ landoj, tamen ekzistas bona bazo por la interrilato inter la Ĉina Popola Respubliko kaj Francio, ĉefe pro tio ke ili ambaŭ konsentas jenajn principojn: ĉiuj landoj ĉu grandaj aŭ malgrandaj estas egalaj, kia ajn estas ilia socia sistemo; ĉiuj landoj devas respekti unu alies suverenecon kaj teritorian integrecon. Aferoj de ĉiuj landoj kaj popoloj devas esti solvitaj de la respektivaj landoj kaj popoloj sen interveno de ekstere, laŭ la principo de sendependeco de la landoj. Por plibonigi la internacian situacion, Ĉinio kaj Francio oponas kontraŭ ĉia ajn hegemonio.

La oficiala vizito de Prezidanto Pompidou al la Ĉina Popola Respubliko faris kontribuon al plifortigo de la interligo inter la du landoj kaj la amikeco inter iliaj popoloj.





Akompanate de Ĉefministro Ĝou Enlai, Prezidanto Pompidou kun la aliaj altrangaj oficistoj de Francio faras rondiron en la aerodromo por intervidiĝi kun la miloj da bonvenigantaj popoloj.

Prezidanto Pompidou ricevis varman bonvenigon de popolamasoj de nia ĉefurbo, kiam li traveturis Tian-anmen-placon en sia veturado al la gasta domo en akompano de Ĉefministro Ĝou Enlai.



Venka Antaŭenmarŝo sub la Kuraĝigo de la Spirito de la Dekaj Kongreso de la Partio


— La Ĉefurbaj Popolanoj Celebris la 24-an Datrevenon de la Fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko

LA unuan de oktobro, en nia ĉefurbo Pekino flirtis ruĝaj flagoj, sonoris kantoj. Gvidantoj de la Partio kaj registaro de nia lando partoprenis en grandiozaj amuzaj aktivadoj en ses parkoj kune kun 500,000 urbanoj, por celebri la 24-an datrevenon de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko kaj varme akلامي novajn venkojn akiritajn de nia lando en diversaj frontoj sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio.

ĜOJPLENA TAGO

La Nacia Festo de la kuranta jaro okazis ĝuste post kiam nia Partio ĵus kunvokis sian dekan kongreson kun profunda influo en la historio de disvolviĝo de la Partio, tial vastaj amasoj dronis en eksterordinara ĝojo. En ĉiuj amuzejoj oni vigle prezentis artajn programerojn, kiaj *Radias la Dekaj Kongreso de la Partio, Ĉie Cirkulas la Ĝojinda Informo de la Dekaj Kongreso de la*

Ĝongŝan-parko en la Nacia Festo






Partio, Mil Kantojn al la Partio, Himno al Prezidanto Maŭ k.a. Iuj el la programeroj kantis pri la granda venko de frakaso de la kontraŭpartia klico de Lin Biaŭ, kaj aliaj kuraĝigis homojn serioze studi kaj efektiviĝi la spiriton de la Deko Kongreso de la Partio. Gajaj kantoj kaj dancoj plene esprimis senliman amon kaj profundan sen-

timenton de la ĉefurbaj popolanoj al la Partio kaj Prezidanto Maŭ.

En impona muziko, laboristoj de medikamenta industrio de Pekino, tenante ruĝan flagon en mano, laŭlegis poemon *Himno al Ruĝa Flago*, kiun ili verkis en la movado de kritiko al Lin Biaŭ kaj reĝustigo de laborstilo. Presentante, ili varme pri-

En Tiantan-parko de Pekino





Samdek Norodom Sihanuk kaj lia edzino, Samdek Penn Nouth kaj lia edzino, Speciala komisiito Ieng Sari kaj aliaj kamboĝaj honoraj gastoj rigardas amuzan prezentadon en Ĝongŝan-parko, akompanate de Ĝou Enlaj, Vang Hongven, Je Gianjing kaj niaj aliaj partiaj kaj registaraj gvidantoj.

kantis grandajn venkojn akiritajn de la tuta Partio sub la gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ en batalado kontraŭ ĉiaj oportunistoj, kaj esprimis la decidon de la laborista klaso ĉiam venke antaŭenmarŝi sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, alte tenante la revolucionan ruĝan flagon.

Ju pli longe maljuna ruĝarmeano Hu Jenŝou aŭdis la poemon, des pli forte li emociiĝis. Li diris: “Nia Partio, nia patrolando kaj niaj diversnaciecaj popoloj havas hodiaŭon tute dank’ al la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ kaj direktado de lia revolucia linio.”

BONEGA SITUACIO

Antaŭ la Nacia Festo, unu post alia venis ĝojindaj novaĵoj el la industria fronto de la ĉefurbo pri antaŭdata plenumo de produkta plano de la tria trimestro de la kuranta jaro. Danco *Batalo antaŭ Forno* prezentata de laboristoj de la Ĉefurba Fera-ŝtala Kompanio kvazaŭ venigus spektantojn antaŭ fajreroŝprucigantan ŝtalfandan furnon, kaj montris firman volon de la laborista klaso en konstruado de socialisma patrolando. Tra la movado kritiki Lin Biaŭ kaj reĝustigi laborstilon, la ŝtala pro-

duktokvanto de tiu kompanio de januaro ĝis septembro de la kuranta jaro kreskis je 10% kompare kun tiu de sama periodo de la pasinta jaro. Laboristoj de Muĉeng-gian-karbominejo prezentis dancon *Por Pli-produkti Karbon*, kiu spegulis, ke la laboristoj de la karbominejo venkis multajn malfacilojn kaj kreis novan rekordon de alta produktokvanto kaj bona kvalito kun senkompare heroa spirito. Ili akiris tiun sukceson en sinsekvaj ses jaroj. Post antaŭdata plenumo de produkta plano de la tria trimestro de la kuranta jaro, la Pekina Vini-lona Fabriko rapide levis novan produktan tajdon sub la instigo de la spirito de la Deko Kongreso de la Partio. Laboristinoj de la fabriko prezentis dancon *Nova Starto* per graciaj movoj, kiu esprimis decidon de la laboristoj kaj oficistoj de la tuta fabriko batali por gajni ankoraŭ pli grandajn venkojn.

Ĝojindaj novaĵoj pri riĉa rikolto de la kuranta jaro en agrikulturo donis al homoj novan kuraĝigon. Ĉijare vastaj amasoj de komunumanoj de la antaŭurbo de Pekino refoje akiris riĉan rikolton post la lastaj sinsekvaj riĉrikoltaj jaroj sub la direktado de la linio de la Naŭa Kongreso de la Partio. La totala produktokvanto de la somerri-



Danco de Hingiang en Ĝongŝan-parko

koltita greno pliiĝis je pli ol 40% kompare kun tiu de 1972. Tiutage, kun plena ĝojo ili venis de la antaŭurbo por partopreni en amuza aktivado. Vang Mingĵu, reprezentanto de la Deko Kongreso de la Partio kaj sekretario de la partia filio de Gaŭling-brigado de Mijun-gubernio, ekpensis travivaĵojn de sia brigado rigardinte dancon *Komunumanoj Ĝoje Ekfalĉis Riĉrikoltajn Plantaĵojn*. Antaŭ kelkaj jaroj, Gaŭling-brigado estis postiĝinta brigado. En 1969, juna Vang Mingĵu estis elektita kiel sekretario de la partia filio de la brigado, kaj li profunde disvolvis movadon lerni de Daĝaj en agrikulturo kune kun vastaj amasoj, tiel ke ŝanĝiĝis la postiĝinta fizionomio de la brigado. En la lasta sekegeca jaro, la pomua produktokvanto de Gaŭling superis 500 kilogramojn kaj ĉijare la somerrikoltita greno pliproduktiĝis je 54% kompare kun tiu de la lasta jaro. Vang Mingĵu esprimis ke li volas revizii perspektivan planon por

fari pli grandan kontribuon al la ŝtato laŭ la spirito de la Deko Kongreso de la Partio.

La celebrantaj amasoj en la parkoj varme akklamis ankaŭ novajn forte kreskantajn aferojn kaj novajn venkojn en kultura, arta, eduka, higiena kaj aliaj frontoj en la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la movado kritiki Lin Biao kaj reĝustigi laborstilon. La Pekina Medicina Instituto prezentis dancon *Bona Kuracisto de Pekino*, kiu priskribas bonajn servojn faritajn de revoluciaj instruistoj kaj studentoj en rondira kuraco en Hiŝuangbanna de Junnan-provinco ĉe sudokcidenta landlimo de nia lando. Dum instrua reformado, ili venis de la ĉefurbo al Hiŝuangbanna. Tie profundiĝinte en la vilaĝojn de Taj-nacieco, ili kaj lernis de amasoj kaj kuracis malsanulojn. Samtempe ili helpis la lokan popolon en kulturado de iliaj kuracistoj. La taj-anoj kare nomis ilin “niaj kuracistoj de Pekino”.

En gaja atmosfero, komandantoj kaj soldatoj de la Pekina Garnizona Trupo interparolis kun laboristaj milicianoj de Pekino pri sia intima rilato de unuiĝo en batalo. Antaŭ tri tagoj, milionoj da reprezentantoj de ĉefurbaj laboristaj milicianoj solene kunvenis por celebri la 15-an datrevenon de la granda alvoko de Prezidanto Maŭ “**fondi milican divizion**”. Ili decidis pli bone organizi milicianojn laŭ urbaj kondiĉoj kaj ofte fari militan ekzercon por multe kontribui al plifortigo de la diktaturo de la proletaro kaj sin prepari al batalo kontraŭ agresa milito. Ili firme esprimis: Ni nepre dronigos malamikojn en la maron de la popola milito, se ili aŭdacos invadi nian landon.

Samlandanoj el Tajvan, Hongkong kaj Aŭmen, transmaraj ĉinoj kaj eksterlandanoj

de ĉina deveno el kvin kontinentoj ĝoje celebri la Nacian Feston kune kun ĉefurbaj popoloj. Kien ili iris, tie ili sentis samsangan amon. Samlandanoj de Tajvan-provinco elmigrintaj al Japanio, Usono kaj Okcidenta Germanio tre kortuŝiĝis aŭdante, ke iu aktorino kantis la kanton *Samlandanoj de Tajvan — Miaj Samsangaj Fratoj*. Ĵus kiam finiĝis la kanto, ili tuj ascendis la scenejon kaj laŭte kantis tajvan-an popolan kanton *Tajvan-insulo kaj la kanton Mar-navigo Dependas de Stiristo*. Ĉen Juhuj, samlandano elmigrinta al Okcidenta Germanio, kun ekscitiĝo laŭtleĝis novan versaĵon verkitan de li mem:

*Dum ĝoja celebrado de la nacifesta horo
en la ĝarden' pekina, ho, varmiĝas mia
koro.*

Laboristinoj rigardas artan prezentadon en la Kultura Palaco de Laboranta Popolo.





Ĉinoj de Tajvan-provinco elmigrintaj al Japanio en amuza kunveno, en Ĝongŝan-parko

*Pri l' venkoj oni kantas per mil kaj mil
melodioj,
la varma frata amo cirkuladas ja en ĉio.
Tajvan nia certe liberiĝos el l' infero,
Patri' la granda vivos tiam en primavero.*

NIAJ AMIKOJ TROVIĜAS TRA LA MONDO

Pli ol 5,000 geamikoj el pli ol 80 landoj kaj regionoj de la kvin kontinentoj ĝoje partoprenis la festan amuzan aktivadon en la parkoj kune kun la ĉefurbaj popolanoj kaj esprimis al nia popolo festan gratulon. Ili ricevis varman bonvenigon de la ĉefurbaj amasoj en ĉiuj amuzejoj. La ĉefurbaj popolanoj profunde komprenis, ke la rilatoj inter nia lando kaj aliaj landoj akiris grandan disvolviĝon sub la direktado de la revolucia diplomatia linio de Prezidanto Maŭ, kaj niaj amikoj troviĝas ĉie tra la mondo.

Multaj eksterlandaj geamikoj ĝoje kantis kaj dancis kune kun la ĉefurbaj popolanoj. Kamaradoj de Amikeca Vizita Delegacio de Albanio gaje ascendis la scenejon kaj kantis

albanan kanton *Aglo de Gerila Taĉmento*, kaj per tio ili gajnis varman manklakadon de la spektantoj. Iu vjetnama kamarado ĝoje ascendis la scenejon kaj laŭte kantis:

*Vjetnamio kaj Ĉinio
kun komunaj akvoj kaj montaro
frontas al la sama maro,
al matena sun' similas amikeco nia.*

La kanto spegulas profundan amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj Vjetnamio. En varma manklakado geamikoj de Novzelanda Maoria Delegacio iris sur la scenejon, kantis popolan kanton pri amikeco kun sia nacia gusto, prezentis dancon *Batalo*, kiu esprimas oponon kontraŭ agreso kaj subpremo. Ilia prezentado ricevis varman bonvenigon de la spektantoj.

Edzino de usona amiko Edgar Snow venis al Ĉinio en 1970 kune kun sia edzo por partopreni en celebrado de la Nacia Festo de Ĉinio. Ĉijare ŝi refoje venis al Ĉinio kune kun sia filino por celebri la feston de la ĉina popolo. Ŝi diris: "Ni

persone spertis profundan amikecon de la ĉina popolo al la popolo de diversaj landoj. Mia filino povas propraokule vidi, kiom grandan honoron la ĉina popolo donis al ŝia patro.” La filino de Snow diris: “En Usono troviĝas multaj junuloj kiuj esperas amikiĝon kun la ĉina popolo. Kiel junulino mi faros kontribuon por akceli la amikecon inter la popoloj de Usono kaj Ĉinio.”

Iu kuracistino de Aŭstrio, kiu helpis nin en la liberigita regiono de Ŝanĥi, Ĉahar kaj Hebej en la periodo de la Kontraŭ-japana Rezistmilito kaj Liberiga Milito, ĝoje diris, ke antaŭ la Liberiĝo ŝi kaj ĉinaj kamaradoj kune batalis pli ol naŭ jarojn. Nun ŝi vidis venkan frukton kaj feliĉan vivon de la ĉina popolo post longa revolucia batalo. Ŝi diris, ke hodiaŭ ŝi kune kun la ĉina popolo ĝuas feliĉon.

La vastaj ĉefurbaj amasoj kun proleta internaciismo esprimis sinceran dankon al la popoloj de diversaj landoj pro ilia amikeco kaj subteno al la revolucio kaj konstruado

de Ĉinio. Ili decidis pluapaŝe plifortigi kaj disvolvi solidarecon kaj amikecon kun la popoloj de la tuta mondo.

Sinjorino Lois Snow (la unua de dekstre), edzino de la usona fama verkisto Edgar Snow, kaj ŝia filino Sian Snow (la unua de maldekstre) en amuza kunveno de Gongŝan-parko



Geamikoj el diversaj lokoj de la mondo kaj pekinanoj en amuza kunveno




Vizito al la Tangŝan-a Ŝtala Fabriko

LA Tangŝan-a Ŝtala Fabriko, kiu situas en Hebej-provinco, ĉe Bohaj-golfo, estas mezgranda kaj nun marŝas sur la vojo de disvolviĝo en kombinumon de ercofosado ĝis laminatado.

Dum la vizito, mi estis profunde impresita de la kreivo kaj efektiva, serioza penado de la laboristoj en plenumo de la ĝenerala linio de socialisma konstruado de nia lando. Depost la Granda Proleta Kultura Revolucio ĉiujare ili superplenumis produktan planon difinitan de la ŝtato.

Ŝtalfandejo




UNU TAGO PLI OL UNU JARO

En kontoro de iu laborejo, ni renkontis pli-ol-40-jaran laboriston Meng Hjueguang, kiu laboris tre elstare en la fabriko jam 20 jarojn. Ni informiĝis de li multe pri la pasinteco kaj hodiaŭo de la fabriko, kaj eksciis kiel ĝi iom post iom disvolviĝis el kaduka fabrikaĉo en avangardan unuon de metalurgia industrio de nia lando.

Meng Hjueguang diris: Kvankam ni jam havas LD-metodan konvertoron kaj aliajn novajn ekipaĵojn, tamen la plejparto de konvertoroj kaj laminatmaŝinoj estas malnovaj, plurfoje reformitaj teknike, kaj la plejparto de laborejoj estas ankaŭ rekonstruitaj aŭ plivastigitaj surbaze de la malnovaj.

Antaŭ la Liberiĝo, la plej alta jara produktokvanto ambaŭ de ŝtalo kaj ŝtalaj materialoj de la fabriko estis nur pli ol mil tunoj. En 1949, la fabriko havis entute tri ĉefajn laborejojn por ŝtalfandado, laminatado kaj fajrrezista materialo. En 1952, la laboristoj unuafoje reformis la malnovan konvertoron kun deflanka oksigen-blovo. En 1957, la produktokvanto de ŝtalo kaj de laminatitaj ŝtalaĵoj atingis respektive 239,000 tunojn kaj 113,000 tunojn. Laborejoj de la fabriko rapide multiĝis de 4 ĝis 12 en la tri jaroj de 1958 ĝis 1960, en la periodo de granda antaŭensalto de la nacia ekonomio de nia lando. En 1960 la produktokvanto de ŝtalo superis 558,000 tunojn kaj tiu de laminatitaj ŝtalaĵoj superis 376,400 tunojn.

La disvolvo de produkto ne nur devenis de la plibonigo de ekipaĵoj, sed ankaŭ estas plena de politikaj bataloj. En iu tempo post 1961, la produkto de la fabriko iom malaltiĝis kaŭze de la reviziisma linio antaŭenpuŝita de Liu Ŝaŭki. Ekde 1966, post la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio, tiu kontraŭrevolucia reviziisma linio estas likvidita kaj kritikita de la laboristoj de la fabriko. Dank' al tio la aktiveco de la amasoj por konstrui socialismon denove ricevis akcelon, tek-



nikaj renovigoj kaj teknikaj reformoj ree disvolviĝis, kaj la produktokvanto leviĝis jaron post jaro. La produktokvanto de ŝtalo kaj laminatitaj ŝtalaĵoj en 1972 kreskis kelkcentoble kompare kun tiu de 1949, nome, nun la taga produktokvanto estas pli granda ol la jara produktokvanto en la komenca periodo post la Liberiĝo. Tio plene montris la superecon de la socialismo kaj la grandan kreivan forton de liberigitaj laboristaj amasoj.

DONITA EKZEMPLO

Ĉiuj vizitantoj estas impresitaj de la giganta ŝanĝiĝo de la fabriko kaj kortuŝitaj de la penema spirito de la laboristoj por firmigi la entreprenon en malfacilaj kondiĉoj.

Foje, ni venis antaŭ iun konvertoron kaj vidis, ke kelkaj junuloj laboras kun plena fervoro. Ili estas membroj de unu el la avangardaj kolektivoj de la fabriko, la grupo gvidata de Vang Jijuan. Depost la fondiĝo de la grupo en 1958, ĝiaj membroj estas multfoje ŝanĝitaj, sed ĉiuj novaj grupanoj heredis kaj disvolvis la bonan penson kaj bonan laborstilon de antaŭuloj kaj konservis la bonan tradicion. Ili ĉiujare superplenumis la produktan planon.

La unuaj sep membroj de la grupo estis laboristoj kaj kamparanoj liberigitaj el la mizero, kiun trudis al ili la malnova socio. Ili varme amis la Kompartion kaj Prezidanton Maŭ kaj laboris kun

neelĉerpebla energio. Iuj el ili partoprenis en rekonstruado kaj disvolvado de la fabriko tuj post la fondiĝo de la nova Ĉinio. Tiam la produkto estis preskaŭ en paralizo. Surbaze de la malnova fabriko ili sarkis herbojn, ebenigis la teron, riparis rustiĝintajn ekipaĵojn kaj persistis en produktado. Poste, ili plenumis la produktan taskon asignitan al ili por la periodo de la Unua Kvinjara Plano de 1953 ĝis 1957 de nia nacia ekonomia konstruado.

En 1958 la Komunista Partio de Ĉinio publikigis la ĝeneralan linion **“streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie”**. Kune kun siaj kamaradoj Vang Jijuan serioze studis la spiriton de la ĝenerala linio kaj faris decidon multe produkti bonkvalitan ŝtalon por subteni la socialisman konstruon. Tiam la disvolvo de la produkto estis malhelpata de la malnovaj ekipaĵoj, postiĝintaj teknikoj kaj manko de produkta sperto. La grupo de Vang Jijuan kaptis la ĉefajn malfortajn punktojn en la produktado, aktive faris teknikajn reformojn kaj teknikajn renovigojn kaj levis la produktan kapablon.

Ekzemple, en la pasinteco la aĝo de la postiĝinta konvertoro kun deflanka oksigen-blovo estis tre mallonga. La tempo bezonata por riparado, dum kiu la konvertoro malfunkciis, estis longa. La nomita grupo foje kaj refoje reformis ĝin, kaj plilongigis la fornoaĝon pli-ol-20-oble.

Krome la nomita konvertoro antaŭe povis produkti nur du specojn de ordinara karbonŝtalo

La grupo rompis la malnovan rutinan regularon, kaj post multfoja provado, sukcesis produkti malaltan alojŝtalon, ŝipkonstruan ŝtalon, siliciŝtalon por elektromaŝinoj, facile tranĉeblan ŝtalon kaj aliajn, sume pli ol 80 specojn.

Kompreneble, la aferoj iris ne ĉiam glate, kaj en ĉiu provo por produkti novan ŝtalspecon oni renkontis malfacilojn kaj malsukcesojn. Sed kun laborista sentimeco ili persistis en praktikado kaj fine akiris venkojn unu post alia.

La revolucia spirito de la grupo kuraĝi fari renovigojn kaj batali kontraŭ malfaciloj multe kuraĝigis kaj antaŭenpuŝis la amasan movadon de teknikaj renovigoj kaj stimulis la produktadon.

KRISTALIĜO DE KOLEKTIVA SAĜO

Iu laboristo al mi diris: Vang Lianjuan, kiu estis antaŭe lernanto de Vang Jijuan, estas estro de alia ŝtalfanda grupo. Foje, la grupo de Vang Lianjuan proponis al la grupo de Vang Jijuan fari konkurson en produktado. Dum la konkurso, Vang Jijuan ne nur zorgis sian grupon, sed ankaŭ meminiciate helpis Vang Lianjuan ripari la mankon de simpleco en interrilato kun la grupanoj kaj teknike korekti malĝustaĵojn en manipulado. Rezulte, la grupo de Vang Lianjuan superis tiun de Vang Jijuan. Tiam iu diris: "Jen lernanto superis la majstron!" Aŭdinte tion, Vang Jijuan ĝoje diris: "Ne sufiĉas unu bona grupo! La produkto povus altiĝi, nur kiam ĉiuj grupoj progresus."

Dank' al la bona stilo de strikta unuiĝo, reciproka lerno kaj helpo inter laboristoj, teknikistoj kaj kadroj, estas atingitaj ĉiujare novaj kreo, progreso kaj disvolviĝo por la amasa pliprodukta movado de la fabriko. En la tri unuaj trimestroj de la kuranta jaro, teknika grupo de la dua laminata laborejo sukcesis efektiviĝi pli ol dek relative gra-


vajn teknikajn renovigojn. Kiel oni atingis tion? Prezente ekzemplon al ni iu teknikisto diris: Nia tasko estas transformi ŝtalon en taŭgajn blokojn por plua prilaborado. Oni bezonis antaŭe relative longan tempon por plenumi tion, ĉar la ŝtalo devis pasi tra 11 intajloj de la premcilindroj, kaj la produktokvanto ne povis altiĝi. Nia teknika grupo faris klopodojn por mallongigi la tempon, sed sen rimarkinda rezulto. Ĝuste kiam ni estis ĉagrenitaj, laboristoj prezentis al ni proponon redukti la nombron de trapasotaj intajloj de 11 al 9. Post provado ni fine sukcesis realigi tiun proponon kaj la produkto kreskis.

En somero, la produkto de la fabriko estis ĉiam influita de la altaj temperaturo kaj humideco en la laborejoj. Por ŝanĝi tiun staton, iu grupo, resuminte la spertojn de ŝtalfandado en somero akumulitajn dum pluraj jaroj alprenis iujn celtrafajn paŝojn kaj atingis bonan sukceson en la komenco de somero ĉijare. Ĝustatempe ili rekomendis sian sperton al aliaj grupoj kaj proponis efektiviĝi pliprodukton dum somero en la tuta fabriko. La partia komitato de la fabriko alvokis la laboristojn kaj oficistojn lerni de tiu grupo. En la tuta fabriko leviĝis produkta tajdo por gajni altan produkton spite al alta temperaturo. Tiel en la plej varma monato julio, la totala produktovaloro de la fabriko pliiĝis per 33% kompare kun tiu de la sama periodo de la antaŭa jaro, la produktokvanto de ŝtalo altiĝis per 9.9%, la produktokvanto de ŝtalaj materialoj altiĝis per pli ol 40%. Tiel oni akiris pliprodukton en somero.

En la pasintaj pli ol unu jaroj, la fabriko efektiviĝis pli ol 100 relative gravajn teknikajn renovigojn. Preskaŭ ĉiu renoviga projekto estis efektivigita post multfoja diskutado kaj reviziado de laboristoj, teknikistoj kaj kadroj. Tial ili estas fruktoj de kolektiva saĝo.



Vang Jijuan (la tria de maldekstre) lernas kune kun laboristoj.



La Sepa Petrolrefinejo de Dalian

Ŝanĝiĝo de Malnova Petrolrefinejo

DEZIRO EFEKTIVIGITA

En iu tago de frua aŭtuno de 1960, trajno plensarĝita per nafto rapidis en brila suno de Daking-petrolkampo al Dalian.

La nafto estis transportata al la Sepa Petrolrefinejo de Dalian. Kaj ĝi, kiu rafinis nafton importitan en la pasintaj tridek jaroj, estis de tiam rafinonta nafton produktitan de nia lando mem. La laboristoj de la petrolrefinejo sentis neesprimeblan ĝojon kaj fieron pro tio. Kvankam ili sciis, ke ili renkontos multajn malfacilojn por grandkvante rafini enlande produktitan nafton per malnovaj ekipaĵoj, tamen ili diris kun plena memfido: "Jam de longe ni deziras rafini nafton produktitan de nia lando. Nun la laboristoj de Daking jam donis al ni ekzemplon en disvolvo de petrola industrio de nia lando sinapogante sur propraj fortoj, do ni nepre devas venki la malfacilojn, kiel ajn grandaj ili estas!"

Ĝuste tiel okazis en la pasintaj pli ol dek jaroj kiel ili diris. La nafto de Daking estas senĉese transportita al la petrolrefinejo, dum la rafina kapablo de tiu ĉi lasta altiĝas senfine. La valoro de benzino, keroseno, mazuto, lubrikoleo, parafino kaj aliaj produktitaj de ĝi en 1972 estas 2.3-oblo de tiu de la jaro 1965.

SENĈESA TEKNOLOGIA REFORMO

Kiel akiritaj estas la rimarkindaj atingoj? Laboristoj diris, ke reformi kaj renovigi malnovajn ekipaĵojn estas ilia ĉefa rimedo.

Post fondiĝo de la nova Ĉinio, laŭ diligenta kaj ŝparema principo, la laboristoj de la petrolrefinejo plurfoje faris reformon al malnovaj ekipaĵoj, tiel ke la produktokvanto pliiĝis kelkdek-oble. La personaro, movforto kaj ekipaĵoj por rafinado, konservado kaj transportado jam konformiĝis unu kun alia en la produkto. Laboristoj opiniis, ke

pluapaŝa renovigo de la ekipaĵoj bezonas multajn klopodojn por rafini pli multe da nafto, sed iuj timis, ke tio reduktus la produktokvanton, se tia renovigo malsukcesus.

Por solvi la problemon, la sekretario de la partia komitato Tian Vejhin profundigis en la laboristajn amasojn kaj faris vastan enketadon. Li kolektis multajn raciajn proponojn de laboristoj pri pluapaŝa reformo de la ekipaĵoj kaj utiligo de la ekzistantaj materialoj por pligrandigi la ekipaĵojn. Li kaj aliaj kadroj de la petrolrafinejo donis la koncentritajn opiniojn de amasoj al la laboristoj por diskutado, kaj post ripetada diskuto oni venis al komuna kono. Fine ili decidis grandigi la antaŭajn ekipaĵojn, kiu post finkonstruo ĉiujare povos rafini 2,000,000 tunojn da nafto.

La novaj ekipaĵoj estis konstruitaj post venko de manko de materialo. Per tio la petrolrafinejo multe altigis sian prilaboran kapablon. Sed novaj kontraŭdiroj aperis unu post alia: kapablo por malŝarĝo, konservado kaj transportado ne povis kontentigi la novan bezonon, tial la novaj ekipaĵoj ne povis esti plene utiligataj.

Tiam la laboristoj mobiliziĝis por ekspluati latentajn fortojn de la produktaj branĉoj kaj ellabori pliproduktan planon.

Nafta laborejo rekonstruis la trakon por malŝarĝi olean cisternovagonon kaj tiel duobligis la malŝarĝan kapablon.

La laboristoj de la lubrikolea laborejo sinsekve faris plurajn grandajn reformojn de produktaj ekipaĵoj kaj rapide altigis la produktokvanton de lubrikoleo.

Ankaŭ la laborejo de oleproduktaĵoj sukcese aplikis novan teknikon kaj altigis sian kapablon de konservado kaj transportado.

.....

Ĉiuj produktaj prilaborejoj, ĉu de la unuaj fojoj prilaboro de nafto ĝis la duafoja, ĉu de la movforto ĝis la konservado kaj transportado, reformis siajn ekipaĵojn kaj altigis la produktokvanton, tial la produkta kapablo de la fabriko altiĝis multe.


POR NORMAJ PRODUKTAĴOJ

En aŭgusto, 1971, la Sepa Petrolrafinejo ricevis telegramon de iu petrolrafinejo de alia loko postulantan ke ĝi tuj ekspedu vagonon da kontraŭkoagulilo por malaltigi la koaguliĝopunkton de lubrikoleo. La petrolrafinejo tuj faris tion. Sed en la sekvanta tago oni trovis ke la koloro de la kontraŭkoagulilo estas nenorma.

Gvidantoj kaj laboristoj de la fabriko en kuna lernado



*Petrolrafina instalaĵo
en reformado*



Kion fari? Iu diris, ke tio estas negrava, ĉar la produktajo estas ĉiufanke norma escepte de la iom malhela koloro. Sed la aliaj ne aprobis tian opinion kaj diris, ke la nenorma koloro influos la travideblecon de la lubrikoleo. Por garantii la kvaliton la petrolrafinejo tuj telegrafis por revenigi la vagonon da nenorma kontraŭkoagulilo, kaj samtempe ekspedis alian vagonon da kvalifikita kontraŭkoagulilo.

Kvankam la produkto de la fabriko pligrandiĝis rapide, tamen la laboristoj estis ĉiam postulemaj al kvalito. Ili agis tiel ne nur por grandkvantaj produktajoj, sed ankaŭ por provizoraj kaj malgrandkvantaj produktajoj.

Foje, iu laboristo trovis, ke maŝinoleo iomete tralikiĝis tra klapo en cisternon de transformatora oleo. Tio estas malpermesata en procedo de produkto. Kvankam oni ne trovis subnormaĵon en specimena analizo por la cisterno, tamen la laboristoj reproduktis transformatoran oleon laŭ la postuloj de la teknologia procedo.

De la lasta jaro, la benzino, keroseno, parafino kaj aliaj produktajoj de la petrolrafinejo kvalite estis tute normaj, kaj la procento de ĝiaj normaj produktajoj atingis 99.5%.

Nun, la Sepa Petrolrafinejo de Dalian profunde disvolvas amasan aktivadon de teknika reformo kaj ekspluatado de produkta latentaj fortoj kaj la laboristoj klopodas por gajni pli grandajn sukcesojn.

Venka Batalo kontraŭ Sekegeco

— Notoj pri Heroaĵoj de la Popolo de Hijang-gubernio en Batalo kontraŭ Sekegeco por Semado

EN 1972 Hijang-gubernio trafis senprecedence seriozan sekegecon, tamen tio ne influis la produkton kaj vivon de la komunumanoj, ĉar la produktaj grupoj kaj la komunumanoj havis rezervatan grenon. Por venki la sekegecon la popolanoj de Hijang elmetis al si la batalan sloganon “en la vetero granda sekeco, ĉe la homoj alta fortostreĉo”. Ili pene batalis kontraŭ la trosekeco la tutan pasintan jaron kaj plenumis pli ol 500 irigaciajn konstruajn objektojn, pligrandigis la irigaciatan areon je 620 hektaroj kaj dank’ al tio ili gajnis relative bonan rikolton. Multe suferinta maljuna kamparano diris emocie: “Je okazo de natura katastrofo en la malnova socio ne eblis kresko de grenplantoj pro manko de pluvo kaj la gepatroj ne povis nin vivteni. Hodiaŭ la socialismo kaj la kolektiva ekonomio ne nur havigis al ni feliĉan vivon eĉ en la tempo de naturaj katastrofoj, sed ankaŭ ebligis al ni gajni riĉan rikolton.”

SERIOZA TROSEKECO, ALTA FORTOSTREĈO

En printempo de la kuranta jaro, cirkulis en Hijang jenaj vortoj: “Kontraŭ la senprecedence serioza trosekeco senprecedence alta fortostreĉo.” La trosekeco daŭris 17 monatojn de 1972 ĝis 1973. En la lastaj vintro kaj printempo falis nek neĝo nek pluvo, tiel ke la riveroj en la gubernio romp-


sian fluadon kaj malgrandaj akvorezervejoj sekiĝis kaj okdek procentoj de la kampoj ne taŭgis por semado pro trosekeco de la grundo. Sed ĉio ĉi tio estis nenio por Hijang-anoj. Sub la gvido de la partia komitato de la gubernio kaj kun la heroa decido de “nepra venko super la naturo” ili aktive ekspluat- tis kaj utiligis subteran akvon. Kaj dum la daŭro de 50 tagoj de aprilo ĝis majo, ili vektportadis akvon kaj prisemis akvumante pokave 14,700 hektarojn da maizo, sorgo kaj milio.

Fine en junio de la kuranta jaro falis en Hijang sufiĉa pluvo kaj la kampoj estis bone saturitaj. La komunumanoj ne perdis la tempon kaj rapide semis 9,400 hektarojn da aŭtunaj grenoj. Nun la plantoj kreskas prospere kaj donas esperon de riĉa rikolto. Kiam oni demandis kamaradon Ĉen Jong- guj, sekretarion de la partia komitato de Hijang, per kio la popolanoj de Hijang venkis la seriozan trosekecon, li diris montrante siajn ŝultrojn: “Per tio ĉi, per la bonaj pensoj kaj bonaj teknikoj maturiĝintaj en la sesjara lernado de Daĝaj en agrikulturo, Hijang-anoj kreis la mirindaĵon.”

En la printempa semtempo, iuj opiniis fronte al la serioza sekegeco, ke se ne pluvos, la semtempo forpasos kaj semado estos neebla. Ankaŭ spertaj maljunaj kamparanoj tre maltrankviliĝis pro tio.

Ĉu atendi pluvon aŭ mem ekagi por venki la trosekecon? La partia komitato de Hijang-gu-

Kadro kaj komunumanoj de Daĝaj-brigado instalas akvo-kondukan tubon sur Hutoŭ-monto.



bernio decidis eduki kaj movi la popolamasojn de la tuta gubernio al batalo kontraŭ trosekeco. Ĝi alvokis la popolanojn daŭre disvolvi la revolucion spiriton “en la vetero granda sekeco, ĉe la homoj alta fortostreĉo” por ĝustatempe kaj bone plenumi la printempan semadon per vektoportado de akvo kaj pokava akvumado. Ĉiuj kadroj inkluzive de la guberniaj kaj komunumaj partiaj komitatanoj ekagis kune kun la vastaj amasoj de komunumanoj, vektoportis sitelojn kaj puŝis ĉarojn al la batalfronto kontraŭ la trosekeco.

Tiam la gubernio havis nur pli ol 50,000 laborfortojn. Tamen la nombro de partoprenantoj en la batalo kontraŭ la trosekeco eĉ atingis pli ol 90,000. En tiuj streĉaj tagoj la dompordoj de multaj produktaj grupoj estis ŝlositaj kaj la komunumanoj, ĉu viraj aŭ virinaj, ĉu junaj aŭ maljunaj, ĉiuj iris al la kampoj kaj konkure portis akvon mane aŭ ŝultre.

Sub la gvido de la partia filio de la brigado pli ol 100 gejunuloj de Bejgiedu-brigado organizis sin en sturman taĉmenton por transporti akvon. Ili kondukis kvindek ĉarojn kaj kvarfoje ir-reiris dum unu diurno por alporti akvon de tre fora loko. La montovojetoj estis mallarĝaj kaj tre malfacilaj, kaj ĉiutage ili devis piediri pli ol 50 kilometrojn. Sed sentime al laciĝo kaj penoj ili transportis dum iom pli ol monato 300,000 sitelojn da akvo por akvumi

la pli ol 60 hektarojn da sekaj kampoj sur monto-deklivoj.

KADROJ ĈIAM BATALIS SUR LA UNUA FRONTO

La popolanoj en Hijang-gubernio ĉiuj diris, ke estas la kadroj kiuj plej multe ŝvitegis en la batalo kontraŭ la trosekeco. Laŭ la instruado de Prezidanto Maŭ, ili ĉiam donis bonan ekzemplon kaj faris tion kion ili postulis al aliaj.

Je la kvara matene iu komunumano de Nannaŭ-brigado en Daĝaj-komunumo jam eliris por puŝi akvo-ĉaron. En la tago li trifoje transportis akvon kaj ĉiufoje devis iri 15 kilometrojn. Kiam li revenis hejmen post plenumo de sia laboro, li tuj iris vektoportu akvon kune kun la komunumanoj. Oni demandis al li, kial li tiel pene laboris? Li diris montrante Li Suoŝoŭ, sekretarion de la partia filio de la brigado: “Vidu, kiel laboregas Suoŝoŭ!”

De la mateno ĝis la vespero, Li Suoŝoŭ ĉiam laboris kune kun la komunumanoj en vektoportado. Foje li portadis akvon tuttage kaj vespere li ankoraŭ iris al la kampoj en riverujo por interkonsiliĝi kun aliaj pri baro de subtera fluo. En la tuta tago li prenis neniom da manĝaĵo kaj pro tio li kaptur-niĝis kaj sentis nigriĝon antaŭ la okuloj. Komunumanoj



En la batalo kontraŭ sekegeco, Sigiĝuang-brigado de Hijang-gubernio konstruis pumpstaciojn.

manoj admonis ke li ripozu. Li nur iom ripozis kaj post manĝo denove eklaboris kune kun la komunumanoj.

Estas nefacile trovi kadron en Hijang-gubernio kiu ne ŝvitis en la batalo kontraŭ la trosekeco. Ĝuste kiel kamarado Ĉen Jonggij diris: "Vi scios kiel la kadroj penlaboris, nur se vi palpos iliajn ŝultrojn, premos iliajn manojn kaj pririgardos iliajn vizaĝojn." Vicsekretario de la gubernia partia komitato Ĝou Mancang, kvankam grandaĝa kaj en malbona sanstato kaj okupata per multaj laboroj, ankoraŭ elpremis tempon por vektporti akvon kune kun la komunumanoj.

Hingdan-ju-brigado en tiu gubernio planis utiligi la akvon en forlasita karbo-mino. Estis Mu Genmu, sekretario de la partia filio de la brigado, kiu la unua malsupreniĝis en la ŝakton por esplori la akvon; denove estis li kiu eniĝis en la ŝakton por instalii pumpilon kaj tubojn; ankoraŭ estis li kiu movis la maŝinon kiam la akva nivelo en la ŝakto malleviĝis. Aliaj volis fari tion sed li ne permesis dirante: "Mi ne povas esti trankvila ke aliaj faros tion. Kiel partifilia sekretario mi devas ĉiam agi antaŭ aliaj." La kadroj de diversaj niveloj en Hijang ĉiam agas modele kaj pro tio ĝuas altan prestiĝon en la amasoj kiuj laŭdis: "Ili ne estas burokratoj sed revoluciuloj."

VALORA STILO


En la pluvomankaj tagoj akvo estis tre kara, tamen por la komunumanoj pli kara ol la akvo estis la komunisma stilo meti la tuton sur la unuan lokon, restigi malfacilojn al si mem kaj cedi favorojn al aliaj.

En tiu flanko Daĝaj-brigado antaŭ ĉio donis bonan ekzemplon. En la lastaj jaroj la akvoutiliga afero de Daĝaj-brigado multe progresis kaj iliaj kampoj relative multe kapablas teni akvon kaj estas ne facile damaĝeblaj de sekegeco. Sed en printempo ĉijara la kampoj de Daĝaj sekiĝis tagon post tago pro perdo de akvo, kio alportis grandan malfacilon al la semado. Kion fari? La partia filio de Daĝaj-brigado decidis elmeti la problemon al la komunumanoj por interkonsiliĝi. En la kunveno iu diris: "Jam ne multas akvo en nia Guoĝuang-a akvorezervejo. Nun sub la serioza minaco de trosekeco multaj produktaj brigadoj pli bezonas akvon ol la nia kaj ni devas ŝpari akvon por ili." Alia diris: "Eĉ se nur nia brigado gajnos riĉan rikolton, la produktokvanto estos ne tiel granda. Por efektiviĝi la instrukcion de Prezidanto Maŭ 'vaste rezervi grenon', ĉiuj komunumanoj kaj produktaj brigadoj en la tuta lando devas gajni riĉan

rikolton.” Fine ili decidis vektporti akvon kaj semadi pokave.

La subluma komunisma stilo de la komunumanoj tuj movis la tutan gubernion. Utiligante akvon de malgranda forlasita karbomino, Nanduhaj-brigado akvumis 20 hektarojn da kampoj kaj semis maizon sur ili. Poste venis tien pli kaj pli multe da homoj por vektporti akvon, kio estigis disputadon inter la membroj de Nanduhaj-brigado. Iuj konsentis tion dum aliaj ne. Tiam inspirate de la partia filio de la brigado la komunumanoj faris kalkulon: Se la tuta komunumo semos 670 hektarojn da kampoj de maizo per la akvo, oni povos

rikolti kvar milionojn da kilogramoj; se la 60 hektaroj da maizo de Nanduhaj-brigado ĉiuj estos irigaciaj per la akvo, tamen aŭtune la totala produktokvanto de la brigado ne povos superi kvincent mil kilogramojn. Kio estas pli grava inter kvincent mil kilogramoj kaj kvar milionoj da kilogramoj? La kalkulo edukis multajn komunumanojn. Ili diris, ke nia Nanduhaj-brigado penas produkti pli da greno kaj subtenas aliajn brigadojn por gajni rikolton riĉan, ĉio ĉi tio celas konstrui socialismon. Maljuna malriĉkampano Gia Huanhiaŭ diris: “Mi tre ĝojos kiam mi vidos ke la maizplantoj sur la kampoj de la tuta komunumo kaj de nia brigado prospere kreskas. Se la kampoj de ĉiuj aliaj bri-



*Komunumanoj
en laboro*

gadoj de la komunumo donus nenian rikolton kaj nur nia Nanduhaj-brigado havus riĉan rikolton, tio tamen ne glorigus nin.”


Sekve la komunumanoj unuvoĉe konsentis akvumi pokave anstataŭ konduki akvon por irigacii. Ili ankaŭ speciale instalas pumpmaŝinon en la ŝakto kaj kondukis akvon per nove konstruita kanaleto apud vojo por ke pli multaj homoj de frataj brigadoj povu facile transporti akvon.

En la 50 tagoj de streĉa batalo, respondante al la alvoko de la partia komitato de la gubernio la popolanoj sur diversaj frontoj sin ĵetis en la batalon kontraŭ trosekeco. Iuj unuoj sendis homojn kaj aliaj provizis aŭtojn kaj ĉarojn. Ŝoforo de la gubernia transporta kompanio Li Ĉenhe transportis akvon por Hoŭĝuang-brigado kaj ĉiutage laboris de la 5-a posttagmeze ĝis la 6-a matene de la sekvinta tago. Komunumanoj admonis al li bone dormi tage. Sed li ĉiam iris antaŭtempe al la laboro kaj diris al aliaj: “Mi neniel povis trankvile dormi, kiam mi aŭdis la bruadon de siteloj de la

komunumanoj.” Apenaŭ malŝarĝinte sian aŭton antaŭtagmeze, ŝoforo Guo Juhing tuj akceptis taskon sendi benzintamburojn al Janĝuang-brigado. Sed Guo Juhing alportis al la brigado ne nur la tamburojn, sed ankaŭ akvon per kio li plenigis ilin survoje kaj rekte portis ilin al la kampoj. Krome li ankoraŭ helpis la komunumanojn malŝarĝi la aŭton kaj je tio la lastaj diris: “Ni jam estas tre kontentaj ke vi alportis al ni benzintamburojn plenigitajn per akvo, ĉu ni ankoraŭ povas lacigi vin per malŝarĝado? Tio ja ne decas.” La ŝoforo respondis: “Decas ĉio, kion ni bezonas en disvolvo de agrikulturo.”

En Hijang-gubernio oni aŭdis ne nur unufoje tiajn disputojn. La komunumanoj ofte diris al la kamaradoj kiuj venis por helpi ilin en la batalo kontraŭ trosekeco: “Ni tre dankas vin pro via forta subteno.” Sed la lastaj respondis: “Niaj manĝaĵoj kaj vestoj devenas de agrikulturo. La rapida disvolviĝo de agrikulturo multe akcelos la disvolviĝon de ĉiuj aliaj aferoj. Vi ja subtenas nin.”

Vicsekretario de la partia filio de Daĝaj-brigado Song Lijing (la tria de maldekstre) estas inter membrinoj de la “Taĉmento de Feraj Junulinoj”.



Rakontoj pri Tibetana Kompartiano Ĉelog

SUR la vasta Mejjike-stepo de Kinghaj-provinco de nia lando cirkulas rakontoj pri kompartiano Ĉelog.

DE SKLAVO ĜIS KOMPARTIANO

Ĉijare Ĉelog havas la aĝon de 56 jaroj. Li estas paŝtisto de Tuoŝi-brigado en Tongde-gubernio. En la malnova socio, lia familio estis tenita en sklaveco de generacio al generacio. La vipo kaj ekonomia ekspluatado pli kruela ol la vipo de la brutposedanto rabis la vivon de lia kara patro. Ĉelog kun aĝo de 7 jaroj almozetadis kun sia frato kaj fariĝis malgranda sklavo en la 10-jara aĝo. Kvankam li laboris penege por la mastro, tamen li ricevis nenion krom pezaj ŝuldoj kaj traŭmatoj.

Liberiĝis Kinghaj-provinco! Finfine venis la feliĉa vivo sopirita de lia familio. Li scias kiel danki la Partion kaj Prezidanton Maŭ per sia agado.

En decembro de 1969 Ĉelog fariĝis membro de la Komunista Partio de Ĉinio pro sia konstanta bonega konduto.

En la jaro 1962, sub influo de la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki, erara premi-politiko estis aplikita en la paŝta regiono de Kinghaj, tial la brigado publikigis en resumo pri sia produktado jenan rezulton: Ĉijare la vivipova proporcio de ŝafidoj el la ŝafaro paŝtata de Ĉelog atingis 97%, dank' al tio 20 ŝafoj kaj 200 juanoj estis juĝitaj al li kiel premio. Sed diligenta Ĉelog ne iris preni la premion. Li stariĝis dirante: "Por akceli laboron iom da premio povas esti donita, sed mi ne komprenas kial vi donis tiel multe."

En la sekvanta jaro, Ĉelog denove ricevis la plej grandan sukceson en la paŝtado de la tuta brigado, kaj la brigado devis premii lin per multaj ŝafoj, sed

li diris: "Tio ne konformas al la politiko de Prezidanto Maŭ, tial mi ne akceptas ĝin."

En la Granda Proleta Kultura Revolucio la paŝtistoj sur Mejjike-stepo kritikis la reviziisman linion de Liu Ŝaŭki, abolis la eraran politikon kaj aplikis racian premi-politikon laŭ la socialisma direkto. Ĉelog tre ĝojis pro realiĝo de la partia politiko.

Tamen ne ĉesis la batalo inter la du linioj. Sub la influo de la devizo "fortranĉi la voston de privata posedsistemo", elmetita de la kontraŭpartia kliko de Lin Biaŭ, iuj sur Mejjike-stepo proponis konfiski al la paŝtistoj privatajn brutojn, ŝanĝis la sistemon preni la produktan brigadon kiel bazan unuon de kalkulo kaj nuligis la racian premi-politikon. Ili diris al Ĉelog: "Vi estas malnova modelo kaj neniam pretendis pri premio, nun la premi-politiko estas nuligita, do vi devas la unua kolektivigi viajn privatajn brutojn?" Sed Ĉelog diris: "La ekonomia politiko de la Partio ja estas ellaborita de Prezidanto Maŭ, kial do oni ŝanĝu ĝin!"

Dank' al firma opono de la paŝtistoj kaj ĝustatempa rimarko de supera organizo de la Partio, la erara faro "fortranĉi la voston de privata posedsistemo" estis rapide ĉesigita sur la stepo, kaj la politiko de Prezidanto Maŭ estis plenumata tie. En tiu ĉi batalo Ĉelog firme staris ĉe la flanko de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj estis laŭdata de la amasoj.

ANTAŬIRANTO EN MALFACILA KONSTRUADO

Kun rapida disvolviĝo de la paŝta entrepreno pli kaj pli multiĝas la brutoj sur Mejjike-stepo. En aŭtuno de 1970, la brigado intencis krei novan paŝtejon por vintro sur Haduo-monto. La monto kun densa arbaro kaj riĉa herbaro altas je pli ol

3,000 metroj super la mara nivelo; antaŭ ĝi estas krutaĵo, dorse montego kaj malsupre la ondanta rivero Giangkian. Ĝi estas fame konata kiel "nesto de lupoj". Por ŝanĝi ĝin en vintran paŝtejon oni devis venki multe da malfaciloj.

La komunumanoj ĉiuj konkure sin anoncis por krei paŝtejon sur la monto. 60-jara maljuna paŝtisto Ĝidekid diris: "Lasu min iri sur la monton, ĉar mi paŝtas bovojn kaj estas pli akomodigema al tiu laboro." Silentema Ĉelog komencis arde diskuti kun Ĝidekid kaj insistis, ke li plenumu tiun malfacilegan taskon. Li diris: "Mi estas pli juna ol vi, do mi iru por tion fari!" Konsiderante ke Ĝidekid estas maljuna kaj al junaj komunumanoj mankas sperto de paŝtado, la brigado konsentis la postulon de Ĉelog.

La brigado intencis sendi homojn sur la monton por helpi Ĉelog post la aŭtuna rikolto, sed Ĉelog maltrankviliĝis pro atakado de lupoj kaj ekagis mem. Tage li paŝtis, nokte elterigis arboradikojn kaj ebenigis la terenon en lumo de brulaĵo. Post tri noktoj li finfine ebenigis terpecon en arbustejo. Poste ĉiuj familianoj de Ĉelog transloĝiĝis kun sia jurto sur la monton kaj kune masonis stalon el argilaj brikoj.

Venis vintro. Neĝo kovris la paŝtejon. Ĉiutage Ĉelog iradis sur la monto por trovi novan paŝtejon. Li trafis neĝblindon pro la brilega neĝo, sed li persiste paŝtis plue. Foje, en la paŝtado li renkontis konfuzan arbustaron. Ĉar li ne povis klare vidi la vojon, la maldekstra okulo frapiĝis kontraŭ branĉo de arbo kaj vundiĝis. Malgraŭ la doloro li pelis kun peno la ŝafaron hejmen palpe irante sur la kruta kaj glitiga montvojo. Vidante lin lia edzino ĉagreniĝis kaj insistis ke li ripozu hejme kelkajn tagojn. Tamen, en la sekvanta tago li denove iris paŝti malgraŭ la okuldoloro kaj neĝblovo, kaj vespere li laŭkutime kontrolis la ŝafaron.

Informiĝinte ke la okulo de Ĉelog estis grave vundita, kadro de la brigado decidis, ke lia filo paŝtu la ŝafaron anstataŭe. Ĝuste tiam oni devis fari preparon kontraŭ frostoj por brutoj. Ĉelog ne volis foriri. Post admonado li enhospitaliĝis. Oni faris al li operacion kaj tri maldikaj lignodornoj estis elprenitaj el la okulkavo. Tiam kuracisto diris emocie: "Li ankoraŭ persistis en la paŝtado kun tiel grava vundo, kiu doloras eĉ feran homon!"

Tuj post resaniĝo Ĉelog revenis al Haduo-monto. Post dujara penega luktado de lia familio kaj parto de la komunumanoj la nova paŝtejo riĉa je akvo kaj herboj estas starigita sur la monto. Ĉiuj diras ke Ĉelog estas penema pioniro de Haduo-monto.

TUTKORE POR LA KOLEKTIVO

Degelis glacio kaj neĝo. Bela somero venis al Haduo-monto. Sovaĝaj floroj pompe floris kaj murmuris riveretoj en la montvaloj. Ĉelog paŝtis la ŝafaron sur montodeklivo. Kiam kelkaj ŝafoj trairis tra dornejo, iom da lano estis deŝirita, Ĉelog tuj kolektis la lanflokojn de sur la dornoj.

Kolektado de deŝirita lano fariĝis lia kutimo. Li tion faras kaj en la stalo kaj sur la vojo. Dum la paŝtado de dek tri jaroj li kolektis pli ol 200 kg. da lano kaj tute ĝin donis al la kolektivo.

Ĉiuj paŝtistoj diris, ke por Ĉelog plej karaj estas la kolektivaj posedaĵoj kaj lia zorgo por la bono de la kolektivo estas tiel vasta kiel la stepo. Foje en neĝa vespero, kiam Ĉelog estis revenonta hejmen pelante la ŝafaron, subite ŝafino falis malsupren de la montodeklivo kaj senmove kuŝis sur la tero pro vundo. Ĉelog tre ĉagreniĝis, prenis ĝin sur la dorson kaj reiris hejmen.

En la jaro 1970, Mejjike-stepo trafis gravan naturan katastrofon. Printempe de la sekvanta jaro, la brigado havis malfacilojn en bredado de sep malgrasaj ĉevaloj. Ĉelog postulis, ke li bredu la ĉevalojn. Kiam la brigado donis al li grenon por la ĉevaloj, li ĝoje akceptis la taskon. Pro malforteco la ĉevaloj ofte kuŝiĝis. Se oni ne ilin restarigus ĝustatempe, ili povus paraliziĝi. Tial Ĉelog kaj liaj fratoj laŭvice gardadis la ĉevalojn tage kaj nokte. Li klopodis ĉiamaniere por bone nutri la ĉevalojn. Dank' al lia zorgado la sep ĉevaloj grasiĝis kaj fortiĝis. Ĉelog redonis ilin kaj la restantan grenon al la kolektivo.

Ankoraŭ pli kortuŝa estas alia afero. Iun tagon, kiam Ĉelog preterpasis la stepon de Dongvu-brigado kun sia ŝafaro, aŭdiĝis malproksime malfortaj ŝafblekoj. Serĉante laŭ la direkto li trovis ŝafidon kuŝantan sur herbejo, tremantan en frosta vento. Li prenis kaj metis ĝin en la sinon. Reveninte hejmen li ĝin nutradis kaj samtempe pridemandis, kiu perdis la ŝafidon.

Sub la bona zorgado de Ĉelog la ŝafido rapide revigliĝis kaj povis iri al paŝtejo kune kun la ŝafaro. Poste li informiĝis, ke la ŝafido estis perdita de paŝtisto Jang Ĝuang de Dongvu-brigado, kaj tuj ĝin kondukis al li. Vidante ke la perdita ŝafido jam fariĝis grasa kaj fortika kaj ke Ĉelog persone ĝin alportis, Jang Ĝuang forte kortuŝiĝis.

Nun, tra Mejjike-stepo cirkulas rakontoj pri la imitindaj faroj de Ĉelog kvazaŭ printempa vento.

Dongfeng-bazaro de Pekino

EN la movoplena komerca kvartalo Vangfuing de Pekino troviĝas Dongfeng-bazaro (t.e. Dong-an-bazaro antaŭ la kultura revolucio). Ĝi estas granda bazaro kun historio de 70 jaroj.

Antaŭvespere de la Liberiĝo, pli ol triono el ĝiaj pli ol 900 butikoj bankrotis kaj la tuta bazaro dronis en agonio.

Post la Liberiĝo, kun la disvolviĝo de niaj industrio kaj agrikulturo la bazaro denove prosperiĝis; precipe en la kultura revolucio la aspekto de la bazaro tute noviĝis post rekonstruado.

PROSPERA ĈIOVENDA HALO

Kiam ni eniris en la grandan kaj helan ĉioendan halon de la bazaro, niaj okuloj estas tuj

kaptitaj de la sceno de vigla kaj prospera komerco.

La bretaroj estas plenigitaj de diversaj varoj, inter kiuj troviĝas diverskoloraj kotonŝtofoj, drapoj, silkaĵoj, felto, termosoj kun belaj desegnoj, horloĝoj, emajlaj vazoj, vestaĵoj, ŝuoj, ĉapeloj kaj trikitaj vestoj, skribiloj, telekomunikaj ekipaĵoj kaj multspecaj ĉiutagaj bezonaĵoj. En la manĝaĵvendejo estas diversaj kukoj, fruktoj, alkoholaĵoj, viandoj ktp. Iu elmigrinto reveninta al la patrolando diris kun miro kaj ĝojo: “Kiel granda ŝanĝo okazis tie ĉi!”

Dum la vizitado kamaradoj de la bazaro sciigis al ni: Antaŭ la Liberiĝo, tie sin trovis nur malhelaj butiketoj, kiuj vendis varojn plejparte importitajn, kiel ekzemple lanteksaĵojn de Britio, galanterion de Francio, emajlaĵojn de Svedio, metalaĵojn



La vendotablo de metiartaĵoj



Angulo de Dongfeng-bazaro

kaj ledon de Germanio, kaj ankaŭ varojn de Usono kaj Japanio. Sed nun en la halo kun spaco de 6,000 kvadrataj metroj 99.7% de la varoj estas produktitaj de nia lando mem, kaj pli ol 70% el ili estas produktitaj de Pekino. Kaj ĝi vendas 18,000 specojn da komercaĵoj, t.e. pli ol 3-oblo de tiuj de la komenca periodo post la Liberiĝo. De 1960 ĝis 1965 nur 25 varioj de poliestera miksteksaĵo estis produktitaj en Pekino, sed nun jam 120. En 1965 estis produktitaj nur 100 specoj da pluvŝuoj, sed nun 210. Nun la varoj estas abundaj kaj iliaj prezoj stabilaj. En la pasintaj 24 jaroj post la Liberiĝo la prezoj de ŝtofoj, ŝuoj, ŝtrumpoj, lavvazoj, glasoj kaj aliaj vivbezonaĵoj de la popolo estas fundamente ne ŝanĝitaj, ekzemple $\frac{1}{3}$ metro da blanka ŝtofo nun ankoraŭ kostas 0.285 juanon kiel en la

komenca periodo post la Liberiĝo. Kaj tiu de diversaj pluvŝuoj ankaŭ ne ŝanĝiĝis. La prezoj de fontoplumoj, medikamentoj, transistoroj kaj aliaj estis plurfoje reduktitaj, iuj eĉ ĝis 20% de la antaŭaj prezoj.

Tie ni vizitis ankaŭ majstron Fan Venliang kun 40-jara laboraĝo. Li diris, ke antaŭ la Liberiĝo tre malmulte da laboruloj venis al la bazaro por aĉetado, sed nun ili ĉiam aĉetas por si plej bonajn vendaĵojn. Ekzemple, lastajare li aĉetis vestoŝrankon per 110 juanoj por lia edziniĝonta filino. Tio estis tute ne imagebla por li antaŭ la Liberiĝo. Antaŭ pli ol 40 jaroj, li ricevis de la kapitalisto 3 juanojn ĉiumonate post la fino de lia metilernado, per kiuj li eĉ ne povis aĉeti paron da ŝuoj por ne

paroli pri vivteno de lia tuta familio. Pro manko de mono liaj du filoj mortis de malsano. Sed hodiaŭ tri el liaj kvar familianoj laboras, ĉiu familiano enspezas meznombro 44 juanojn ĉiumonate, kaj jam posedas radioricevilon, kudromaŝinon, brakhorloĝojn k.a. kaj ŝparitan monsumon de centoj da juanoj en banko. Li diris fine kun dankemo: "Ni havas ĉion ĉi tion dank' al la bona gvido de Prezidanto Maŭ!"

SERVI AL LA POPOLO TUTKORE KAJ TUTANIME

Ĉe la riparejo de ledaĵoj en la bazaro paro de mezaĝaj geedzoj dankis foje kaj refoje laboranton premante lian manon kun larmoj. Post pridemando laboranto de la riparejo diris al ni: "Dum la riparado de ilia mansako ni trovis en ĝi 150 juanojn. Hodiaŭ ili venis por preni la sakon kaj ni donis la monon al ili post pridemando. Ili tre ĝojis pro retrovo de la mono, kiun ili longe serĉis vane."

Tre ordinara estas la supre dirita afero en la socialisma Ĉinio. Menciinda estas la bona sinteno de la riparistoj en servado al la klientoj.

La socialisma komerco ĉiam klopodas servi al la popolo. Laŭ la principo esti rigore ŝparema kaj utiligi ĉion utiligeblan, Dongfeng-bazaro starigis riparejon antaŭ longe. Post la komenco de la kultura revolucio la riparejo estas plivastigita kaj riparas ne nur fontoplumojn, horloĝojn, ledaĵojn, sed ankaŭ vestojn, ŝuojn, ŝtrumpojn k.a. Sekvante la instrukcion de Prezidanto Maŭ pri tutkora servo al la popolo, la riparistoj ĉiutage devas akcepti ĉirkaŭ 1,000 objektojn por riparo. Dank' al la diligenta laborado ili ricevis laŭdojn de la klientoj.

Iufoje alilokano venis al la rapida riparejo. Li petis ke oni riparu por li la ŝuojn sur liaj piedoj. Juna laboristino Juan Maŭĝang diris, ke laŭ la regularo tiaj ŝuoj ne povas esti akceptitaj por rapida

riparo. La kliento elpoŝigis sian fervojan bileton kaj montris ĝin al Juan dirante, ke li devas foriri de Pekino post du tagoj. Juan do konsentis ripari la ŝuojn por li en du tagoj kaj petis ke li ŝanĝu la ŝuojn. Sed la lasta diris en dilemo, ke li ne havas aliajn ŝuojn, ĉar li venis al Pekino por portempa laboro. Tion aŭdinte Juan Maŭĝang akceptis la ŝuojn kaj rapide riparis ilin. Kiam la kliento surmetis al si la riparitajn ŝuojn, li diris emocie: "Mi tre dankas vin pro via zorgema servo al klientoj!"

Parolante pri Juan Maŭĝang, ĉiuj majstroj de la riparejo diris: "Malgranda Juan estas bona junulino!" Post sia diplomiĝo en mezlernejo en 1970, Juan komencis labori en la riparejo. Antaŭ sia diplomiĝo ŝi jam multe pensis pri sia estonteco, tamen ŝi neniam pensis ke ŝi fariĝos riparistino de ŝuoj. En la komenco, vidante amason kaj amason da malnovaj ŝuoj ŝi iom ŝanceliĝis. Poste ŝi ripetade studis *Servi al la Popolo* kaj aliajn verkojn de Prezidanto Maŭ kaj konsciis, ke ŝi, kiel membro de la Komunisma Junulara Ligo, devas plenumi la bezonon de la revolucio, kaj ankaŭ la riparistoj, same kiel aliaj laboristoj, servas al la popolo. Tiam ŝi decidis fariĝi bona ŝu-riparistino. En la lastaj kelkaj jaroj, dank' al sia bona servado al la klientoj kaj bona kvalito de ripara laboro, ŝi ricevis laŭdojn kaj de klientoj kaj de oficistoj kaj laboristoj de la bazaro, kaj ŝi estis elektita kiel vicsekretario

La riparejo





La Nacieca Restoracio

de la Komitato de la Komunisma Junulara Ligo de la Unua Komerca Buroo kaj membro de la Pekina Komitato de la Komunisma Junulara Ligo.

“HEJMO DE LABORISTOJ, KAMPARANOJ KAJ SOLDATOJ”

Ĉiunokte, kiam kvietiĝis la movoplena strato Vangfuging, la hele lumigita nokta manĝejo de la Nacieca Restoracio en Dongfeng-bazaro vidiĝas aparte vigla sceno.

La Nacieca Restoracio, antaŭe nomata Dong-lajŝun, estas fame konata pro sia bongusta ŝafaĵo tranĉita en maldikajn pecojn kaj tre rapide kuirita en bolanta akvo. Tamen antaŭ la Liberiĝo, ĝi servis ne al la vasta laboranta popolo sed nur al la riĉuloj. Post la Liberiĝo, ĝia bongustaĵo fariĝis frandaĵo de la vasta amaso de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj en festotagoj aŭ ferioj multaj vizitas la restoracion por ĝui ĝian bongustan ŝafaĵon. Servisto diris al ni, ke antaŭ la Liberiĝo laboristoj

kaj kamparanoj ne havis monon por sin regali per tia ŝafaĵo, sed nun per 1.5 juanoj ili jam povas aĉeti por si $\frac{1}{4}$ kg. da tia bongustaĵo.

La laborantoj de la Nacieca Restoracio trovis dum sia servado, ke klientoj multas precipe vespere antaŭ la fino de la deĵora horo. Post enketado ili trovis, ke inter ili plej multaj estas laboristoj de nokta deĵoro. En la diskuto pri tio, aranĝita de la bazara gvidanto, multaj diris: “Kontentigi la bezonon de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj estas la celo de nia servo.” Kaj sekve ekfunkciis la nokta manĝejo de la restoracio.

La nokta manĝejo servas la klientojn per diversaj rostaĵoj, rizaĵo kaj farunaĵoj, multaj malvarmaj pladoj kaj diversaj vinoj kaj alkoholaĵoj. Ĉiuvespere ĝin vizitas multaj proksime loĝantaj laboristoj de nokta deĵoro, komunumanoj kiuj alportas legomojn al la urbo, stratopurigistoj kaj pasaĝeroj kiuj ŝanĝas vagonon en Pekino. Pro la bona kaj varma servo kaj la malkareco de la manĝaĵoj de la restoracio, multaj laboristoj kaj kamparanoj ofte vizitas ĝin kaj ĝin nomas “hejmo de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj”.

Ĝoja Celebro de la Nacia Festo


—Pri celebrado de pekinaj amasoj pri la 24-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko

Varma aklamado al la granda venko de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj la granda venko de la Deko Tutlanda Kongreso de la Partio





Popolamasoj torentas al parko.



Amuza aktivado en la Kultura Palaco de Laboruloj




“Popolanoj de Jan-
bian Ĝoje Celebras
Riĉan Rikolton”

Ĝoje dancas knabinoj kun papilioj.



Infanoj dancas en Tiantan-parko.



Sur Kunming-lago de
la Somera Palaco
(supre kaj sube)



Veterana Ruĝarmeano kaj Sia Kamparanino-filino

I

Antaŭ nelonge, iu veterana ruĝarmeano venis al Ĝucun-vilaĝo norde de Hajjang-gubernio, Ŝandong-provinco, por viziti sian filinon, kiu loĝas ĉi tie. Tuj komunumanoj kun akraj okuloj tuj ekkonis en li He Kjubaŭ, vickomandanton de Kingdaŭ-a Garnizono de ĈPLA kaj haste kriis: “Jen venas boparenco de onklino Giang!”

La domo de la onklino estis gaja kaj homplena. Sciinte la alvenon de sia patro, He Jutang rapide

revenis nudpiede de la kampo. Rimarkinte sian bofilinon ŝvita, onklino Giang ameme transdonis al ŝi viŝtukon kaj ĝoje diris al He Kjubaŭ: “Bofrato mia, dum la duona vivo mi almozetadis, kaj eĉ en sonĝo mi ne imagis boparenciĝi kun vi kaj havi tiel bonan bofilinon!” He Kjubaŭ diris: “Bofratino, en la malnova socio ni ambaŭ estis malriĉaj kampuloj, kaj nun kvankam ni laboras sur malsamaj postenoj, tamen ni ĉiuj servas al la popolo.”

Kiam He Kjubaŭ pridemandis la laboron de sia filino, maljuna sekretario Ĝoŭ Juting diris: “Kiam via filino ĵus venis, ŝi timis eĉ bovon, sed

Antaŭ la foriro de la filino al kamparo





La unua leciono en la kamparo

nun ŝi kapablas fari ĉiujn laborojn, kiaj transportado de fekaĵo, plugado de kampo kaj hakado de ŝtonoj sur monto.” Aŭdinte tion onkloro Giang laŭdis ankaŭ: “Ŝi laboras timante nek kotajon nek malpurajon.”

En tiuj vortoj He Kjubau trovis, ke la filino vere maturiĝis en la vasta kamparo, kaj tiu urba intelekta junulino plena je naiveco jam fariĝis nov-tipa kamparanino.

II

Antaŭ naŭ jaroj, He Jutang estis mezlernejanino de la urbo Kingdaŭ. Tiam ŝi planis daŭrigi, post sia diplomiĝo el la mezlernejo, sian lernadon en higiena lernejo de la armeo por fariĝi medicina laborantino, aŭ en teknika lernejo. Sed, kiam ŝi estis finanta la studon en la mezlernejo, la lerneja gvidantaro mobilizis parton da lernantoj al la kamparo kaj lerni avangardajn farojn de intelektaj junuloj en la kamparo, kio donis al ŝi profundan edukon.

Pri tio ankaŭ He Kjubau informiĝis kaj multe pensis pri la estonteco de sia filino: Antaŭ la aĝo de naŭ jaroj Jutang vivis en la kamparo de Ŝenhi-provinco kune kun sia patrino. Tiam ŝi kolektis herbojn per korbo kaj paŝtadis ŝafojn. Kial nun ŝi estas ne tiel laborema? Tiam ŝi manĝis maldelikatajn manĝaĵojn kun bona apetito, sed kial nun ŝi jam perdis tian apetiton al ili? Tiuj ŝanĝoj de lia filino konvinkis lin, ke li devas sendi ŝin al la kamparo por ke ŝi kontribuu sian forton al konstruado de la nova socialisma kamparo kaj sin hardu en la vasta kamparo. Li diris la ideon al sia edzino, kiu respondecas pri la loĝkvartala laboro. En tiu tempo ankaŭ lia edzino faris tiun mobilizadon, tial ŝi konsentis lian opinion, dirante: “Kiel kadroj ni devas doni ekzemplon en tio.”

Iutage, kiam Jutang revenis de la lernejo, He Kjubau alvokis ŝin kaj demandis: “Jutang, kian laboron vi volas post la diplomiĝo?” La filino naive kontraŭdemandis: “Kiel vi opinias, paĉjo?” Li diris al ŝi sian ideon. Ŝi eksplodis per sonora rido, dirante: “Paĉjo, mi jam min anoncis!” Parolante ŝi prezentis sian petskribon al sia patro, sur kiu estis nete skribita: “Respondante al la alvoko de la Partio, mi volas labori kiel kamparano dum la tuta vivo.”

La patro kaj la filino ambaŭ venis al la sama ideo. La patro diris kun plena espero: “Nia familio antaŭe loĝis en la kamparo generacion post generacio, sed ekde via generacio ĝi transloĝiĝis en la urbon. Nun, responde al la alvoko de la Partio vi revenos al la kamparo por fariĝi kamparanino. La epoko estas malsama, ankaŭ la signifo diferenca.” Li daŭrigis: “Post kiam mi partoprenis en la Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo en Norda Ŝenhi-provinco kaj iris al la fronto, via patrino kune kun la vilaĝanoj organizis sin en laborinterŝanĝan taĉmenton kaj interhelpan grupon. Ŝi konkure laboris kun la aliaj en ĉio kiaj plugado de kampoj kaj hakado de brulligno. Vi devas imiti vian patrinon, ami la kamparon kaj laboron.”

La vortoj de la patro donis al la filino novan forton kaj spronis ŝin iri sur la novan vojon.

III

La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Ĝucun-vilaĝo varme bonvenigis la alvenon de He Jutang kaj ŝiaj kunlernantoj.

La sekvanta tago post ilia atingo estis ĝuste la tago de la Mezaŭtuna Festo. La malriĉkampa-

ranaj kaj malsuperaj mezkampanoj konkure invitis ilin al sia hejmo por kune pasigi la feston. Komunumanoj alportis al ili legomojn kaj fruktojn. Pli-ol-70-jara onklino Ĝoŭ aparte preparis por ili vaporumitajn pasteĉojn kaj persone tion alportis kun irbastono. Vespere oni du- aŭ tri-ope venis al la loĝejo de Jutang kaj aliaj, kaj iliaj tri ĉambroj estis plenaj je vizitantoj. Jutang pasigis la feston en la kamparo unuafoje kun tiel multaj homoj kaj estis tiel ĝoja, ke ŝi eĉ ne povis endormiĝi ĝis noktomezo.

Tamen la provo de laboro por reformi naturon atendas He Jutang.

Post nelonge ŝi sarkis kampojn de batato kune kun komunumanoj. La 5-futa tenilo de la sarkilo estis por ŝi tiel peza kvazaŭ 50-kilogramo ferstango. En la unua tago ĉiu komunumano sarkis pli ol unu muojn, sed ŝi nur du dekonojn de tio. Krome, sur ŝiaj manoj aperis vezikoj de frotado.

Rigradante siajn vezikojn, ŝi pensis en si, ke nur en la komenco ŝi jam renkontis tiel grandan malfacilon, ĉu ŝi povos persisti en tio longdaŭre?

Post kelkaj monatoj He Kjubau venis al Ĝucun-vilaĝo. De kiam Jutang forlasis la hejmon, la patro ofte pensis, kiel la filino sin hardas en la kamparo, tial li volis viziti ŝin persone.

Jutang estis tre ĝoja pro la alveno de la patro. Tiutage la babilema kaj ridema Jutang parolis pli multe. Ŝi parolis jen pri onklino, kiu instruis al ŝi fari veston, jen pri onklo, kiu lernigis ŝin pri kampa laboro. Kiam la filino menciis pri la vezikoj, la patro ridegis, dirante: "Tio ne gravas. Kiam vi havos dikan tavolon da kalo, tiam vezikoj ne aperos sur viaj manoj." Li diris ankaŭ, ke ŝi devas instrui siajn lernitajn kulturajn sciojn al la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, por ke ili kune konstruu la novan socialisman kamparon.

Post la foriro de sia patro Jutang estas pli entuziasma kaj pli energia en laboro. Tage ŝi laboris en la kampoj kaj vespere helpis malriĉkampanojn kaj malsuperajn mezkampanojn en lernado de kulturo. Jaron post jaro, ŝi vivas kaj laboras kune kun tiuj kamparanoj. Ŝi lernis multon ne akireblan en la urbo kaj lernejo. Ŝi bone komprenis, kiel la revoluciaj antaŭuloj venkis malfacilojn por krei la hodiaŭan feliĉan vivon, kaj decidis sin hardi en novtipan kamparon kun socialisma konscio.

IV

Kun la pliiĝo de sia aĝo ŝi renkontis novan problemon sur sia antaŭenmarŝa vojo: Kiel trakti amaferon kaj edziniĝon?



Lernado de agrikulturaj scioj



Vizito al la filino

En la vilaĝo troviĝas junulo nomata Giang Ping. Lia patro mortis jam antaŭ multaj jaroj. Antaŭ la Liberiĝo li almozpetadis vagante kun sia patrino kaj eklaboris en la kampo je la aĝo de 12 jaroj. La suferplena Giang Ping amas la kamparon kaj laboron, kaj estas eminenta junulo sur la agrikultura fronto. Li fervore instruis ŝin pri kampo-laboro, dum ŝi pacience helpis lin en klerigado, kaj per tio ili starigis inter si profundan amon.

Sed, tiu problemo ondadis en ŝia cerbo. Ŝi opiniis, ke tiu junulo estas aminda, tamen, se ili pariĝos, ŝi devas labori en la kamparo dum la tuta vivo. En tiuj tagoj, kiam tiu afero ŝin turmentadis, ŝi ripetade lernis la instruon de Prezidanto Maŭ: **“Ĉiuj intelektuloj, kiuj povas labori en la kamparo, devas ĝoje iri tien. La kamparo estas vasta mondo, kie oni povas multon fari.”** La vortoj de Prezidanto Maŭ levis ŝian konscion al nova nivelo. Ŝi pensis, ke ŝi venis ĉi tien por konstrui novan socialisman kamparon, sed ne por ĉasi politikan ka-

pitalon. Se bona estas la junulo Giang Ping, kial do ŝi ne povos vivi kun li en la kamparo por la tuta vivo! Tiel Jutang decidis fianĉiniĝon al Giang Ping.

Poste, Jutang skribis la aferon al siaj gepatroj. La patrino pensis, ke ŝi estas jam grandaĝa kaj malsanema, kaj volis edziniĝi sian filinon al junulo, kiu laboras proksime, por prizorgi unu la alian. Aŭskultinte tion, He Kjubau trovis la vortojn de sia edzino pravaj, sed post meditado li neis tion. Nun Jutang jam loĝas en la kamparo, kial ŝi ne povas elekti sian fianĉon tie! Li aprobis la ideon de sia filino.

Post la edziniĝo de Jutang, la patro foje kaj refoje admonis al ŝi, ke ŝi ne montru superecon antaŭ aliaj, aktive partoprenu en kolektiva laboro kaj respektu la bopatrinojn por starigi novtipan familion.

Nun tiu juna paro marŝas antaŭen ŝultron ĉe ŝultro ĉu en lernado kaj laboro aŭ en vivo. Giang Ping laboras kiel sekretario de la partia filio de la brigado, kaj Jutang meminciate faras mastrumadon pli multe, por ke li havu pli da tempo por plenumi la partian laboron. Ankaŭ Giang Ping memkonscie plenumas domlaboron, por ke Jutang multe partoprenu en la produkta laboro kaj la socia servo. La komunumanoj laŭdis, ke ili vivas en harmonio kaj interhelpo, estimas unu la alian kaj donis bonan ekzemplon por aliaj en starigo de nova moro.

V

En la komenca periodo de 1971, sin hardinte en Ĝucun-vilaĝo 7 jarojn, Jutang vidis, ke iuj intelektaj gejunuloj, kiuj alvenis kune kun ŝi, forlasis la vilaĝon unu post alia al novaj laborpostenoj, kaj pensis en si: Ili foriris, kion mi faros?

Iuj proponis al ŝi: “Kial vi ne petas la helpon de via patro?” Jutang pensis, ke la povo de la patro estas donita de la popolo kaj per tio li devas servi por la intereso de la vastaj amasoj, tial ŝi ne devas tion fari!


Foje, kiam ŝi vizitis siajn gepatrojn, ŝi pretervole menciis tiun aferon al sia patro. El la parolo la patro trovis en ŝi iometan ŝanceliĝon por longa vivado en la kamparo. Li ne rekte respondis al ŝi, sed demandis: “Kiel iras via reformado al grundo? Kiel stas konstruado de via brigado? . . .” El la demandoj de sia patro ŝi trovis sian ideon erara. Tiam la patro diris plue: “Via ŝanceliĝo estas ne prava.”

Jutang revenis al Ĝucun-vilaĝo ĉifoje kun pli-alta konscio. En la sekvanta tago ŝi emocie vizitis la lokojn, kie ŝi laboris kune kun la komunumanoj, kaj la montpiedon de Linsi, kie bonorde viciĝas ŝtuparaj kampoj. Antaŭ kelkaj jaroj tie estis ankoraŭ dezertaj valoj, sed nun ili jam fariĝis ebenaj fekundaj kampoj, kiuj donas pomue 285 kg. da greno. En la valo Lanzi ŝi rigardis la fruktĝardenon kun areo de ĉ. 100 muoj, kiu donis tre malmulte da pomoj en la jaroj, kiam ŝi ĵus alvenis, sed nun pli ol 15,000 kg. Kaj en la loko de Gujŝan-akvorezervejo ŝi vidis la kanaletojn de ŝi kaj aliaj konstruitajn kiuj irigacias pli ol 300 muojn da kampoj.

Rigardante tiujn lokojn Jutang sin demandis: Ĉu la ŝanĝo de Ĝucun-vilaĝo ne estas granda? Vere, granda ŝanĝo okazis ĉi tie dank' al lernado de Daĝaj en agrikulturo sub la direkto de la revolucia linio de

Prezidanto Maŭ. Sed oni devas daŭrigi reformadon de la tero kaj forstumadon en la vilaĝo, kaj ankaŭ serĉadon de akvofonto kaj konstruadon de tiu loko. La aliaj iris sur la industriaran fronton, kaj mi laboras en la kamparo, ambaŭ estas bezono de la revolucio. Tio plivastigis ŝian vidspacon. Ŝi diris al si firme: "Mi iros nenien kaj laboros la tutan vivon por konstrui novan socialisman kamparon!"

De tiam forpasis jam du jaroj. Jutang ne vaniĝis kulturadon de la Partio, edukadon de la familio kaj esperon de la malriĉkamaranoj kaj mal-superaĵ mezkmamparanoj. Ŝi efektivigis sian ĵuron per ago. Ŝi neniam forestis de sia kamplaboro ĉu en varma somero aŭ en frosta vintro. Ŝi povas fari ĉian laboron de hakado de ŝtonoj por konstrui kanaletojn ĝis plugado de kampoj. Oni laŭdas, ke ŝi estas filino inda je la veterana ruĝarmeano kaj daŭriganto de la revolucio.



VASTIGO DE LA MANOVREJO DE ŜANHAJGUAN-STACIO

La stacio Ŝanhajguan estas gorĝo de la Pekin-Ŝenjang-a Fervojo. Antaŭ la Liberiĝo, la stacio plenumis nur ordinaran taskon de transportado de pasaĝeroj kaj varoj, nur post la Liberiĝo oni konstruis ĉe ĝi manovrejon por klasifikado de vagonaroj. Laŭ la bezono de rapida kreskado de transporta kvanto oni decidis en la jaro 1971 vastigi la manovrejon.

La vastigado iris sen interrompo de la normala trafikado. La tuta konstruado bezonis fosi kaj transporti 400,000 kubajn metrojn da teraĵo, meti preskaŭ 10,000 kubajn metrojn da balasto, konstrui dekojn da kilometroj da trakoj, preskaŭ cent relforkojn kaj dekojn da domoj. La laboristoj kaj oficistoj de la Ĝenerala Konstrua Brigado de Ĝinĝoŭ-a Fervoja Administretejo, kiuj prenis sur sin la konstruan taskon, rapide kaj bone plenumis la taskon koncentrinte siajn ĉefajn fortojn.

La funkciado dum pli ol 5 monatoj post la finkonstruo de la manovrejo en

la fino de la jaro 1972 pruvis ke ĝia kapablo de trapaso kaj klasifiko de vagonaroj plialtiĝis je 30 procentoj ol antaŭe, kaj ĝustatempa kaj glata transportado de la fervojo estas garantiata.

METIARTAJOJ EL KOKOSFRUKTAJ ŜELOJ DE HAJNAN-INSULO

Hajnan-insulo produktas faman specon de metiartaĵoj el kokosfruktaj ŝeloj. En lastaj jaroj oni elvolvis novon en enhavo, formo kaj esprimmaniero de tiu arto. La specoj de tiaj artaĵoj plimultiĝis de la antaŭaj dekelkaj ĝis ĉirkaŭ cent kaj la jara produktokvanto kreskis de centoj ĝis pli ol 50,000 da pecoj.

Hajnan-insulo abunde produktas kokosfruktojn. Tieaj popolanoj faras el kokosfruktaj ŝeloj diversajn ĉiutagajn bezonaĵojn belajn kaj solidajn. Nun sur la insulo troviĝas fabriko de tiaj metiartaĵoj kaj pli ol 300 laboristoj de tiu metio. La reliefoj, bareliefoj kaj altreliefoj lerte faritaj de la metiartistoj sur tiaj objektoj prezentas la socialisman konstruadon kaj belajn pejzaĝojn de nia lando kun temoj kiaj "Lerni de Daĝaj en Agrikulturo", "Reformi Ĉinion kun la Spirito de la Malsaĝa Avo", "Pejzaĝo en Hajnan-insulo" kaj "Fiŝhaveno kun Kokosarboj".

Suĝoŭ-a Brodarto

En la 12-a numero de 1972 de nia gazeto ni publikigis kelkajn Suĝoŭ-ajn brodaĵojn, kiuj vekis intereson de niaj legantoj. Multaj sendis al ni leterojn por demandi pri ĝia historio kaj pri la metodoj de ĝia farado. Pro tio ni aperigas tiun ĉi verkon de la aŭtoro.

— La Red.

Kiel unu el valoraj heredaĵoj de nia nacio, la Suĝoŭ-a brodarto havas longan historion en la regiono de Suĝoŭ, Giangsu-provinco de orienta Ĉinio.

La historiaj objektoj, trovitaj en Hukiu-stupao en Suĝoŭ en 1956, montras ke antaŭ mil jaroj la arto jam formis sian propran stilon. Post longa praktikado ĝia tekniko senĉese progresis kaj disvolviĝis. Precipe post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, ĝiaj specoj senĉese plimultiĝis dank' al disvolvo de la kolektiva saĝo de laboristinoj. La karakterizoj de la Suĝoŭ-aj brodaĵoj estas eleganteco en desegnoj kaj koloroj, varieco en brodmetodoj kaj subtileco de la steboj.

La brodmetodoj de la Suĝoŭ-a brodarto nun nombras pli ol 40 specojn post la esplorado kaj disvolvado fare de la brodistinoj, ĉiujn kun aparta efiko en esprimado de objekto kun malsama naturo.

Unu el la plej multe uzataj metodoj estas nun la *santaŭĝen-o*, kiu ebligas facilan kurbigon de la stebaro, el kiu la steboj estas paralele vicigitaj en malunueca pozicio, kvankam neniu interrompo estas allasita en linio formita de steboj. Ĉar la pozicio de la steboj estas varia, tiu metodo konvenas por figuri la konveksan formon de la brodata objekto, sen limigo kaŭzita de la gradigo de koloroj, kaj delikate reliefigi la vivan aspekton de floroj kaj birdoj.

Por brodi tradiciajn bildojn de floroj kaj birdoj oni ĝenerale aplikas tiun *santaŭĝen-on*. Kiam oni kreis en 1972 la grandformatan brodaĵon *Prosperas kune cent floroj*, ili uzis ĉefe tiun metodon. Sur la formato de 2.3 m. × 4.3 m., estis broditaj floroj de peonio, magnolio, jasmeno, ĉina rozo kaj aliaj

kaj inter ili du pavoj kun etenditaj vostonplumoj, kvazaŭ volantaj konkuri kun la floroj pri beleco. La brodistinoj, detale observinte la vivon de pavoj, faris la brodaĵon per fadenoj en 14 koloroj kaj en 23 tavoloj.* Estis uzitaj ankaŭ orfadenoj, tiel ke la okulsimilaj makuloj de la pavovostoj brilis ore kaj ke la tuta bildo radias pli da viveco. Krom la *santaŭĝen-o*, estis uzitaj pli ol dek aliaj brodmetodoj en la nomita brodaĵo kaj pli ol 600 specoj de koloraj fadenoj. La tuta bildo estas plena de printempa prospereco.

Pli juna inter la aliaj estas la brodmetodo *luanĝen-o*. La steboj faritaj laŭ tiu procedo aranĝiĝas ŝajne iom senordaj, tamen la dispozicio de la steboj estas farata laŭ postuloj de la figurado de objektoj. Cetere la efektoj de la koloroj estas atingitaj per aldono de diversnuancaj kolorfadenoj, tavolo post tavolo, tiel ke tiu brodmaniero povas atingi riĉecon de koloroj kaj tonoj, precipe taŭga por reprodukti olepentraĵojn kaj fotitajn bildojn. La originala modelo de la brodaĵo *Doktoro Norman Bethune* estas olepentraĵo. La brodaĵo estis farita per metodo de *luanĝen-o* kun kontentiga rezulto. La fono estis brodita per pli dikaj fadenoj por reliefigi la ĉefan figuron per la karakteriza eco de tiu metodo. La brodado de la vizaĝo estis farita per maldikaj fadenoj kaj la koloroj estis iom post iom densigitaj per aldonaj steboj, tiel ke la okuloj brilas per viveco kaj la mieno estas esprimoriĉa, kaj ke la nobla spirito de k-do Bethune estas plene reproduktita.

Punktobrodo estas farata per steboj laŭ la maŝoj de la fontuko el diafana, densa kanvaso. Ĉar ĝiaj steboj estas tre mallongaj, ĝi faciligas enmikson de malsamaj koloroj, eviton de nedezirata

brilo de la silkfadenoj kaj esprimon de nebuleco. Pro tiuj karakterizoj, ĝi povas plej sukcese redoni la efektojn de akveca, difuza streko en la ĉina tradicia pentrarto. Ĝi povas plene reprodukti strekojn sekecajn, aĵurajn aŭ malseke difuzajn, denskolorajn aŭ maldenskolorajn. La brodaĵo *Sovaĝa ansero en neĝo* estis farita per tiu metodo. La sovaĝa ansero strebas antaŭen en vento kaj neĝado, spite al la malfacilaj kaj malfavoraj naturkondiĉoj. Sur ĝia griza korpo alkroĉiĝas blankaj neĝflokaj.

Dank' al siaj multaj brodmetodoj disponataj, la Suĝoŭ-a brodarto disvolviĝis de unukoloreco en la komenco al multkoloreco, kaj eĉ de unuflanka brodo al la duflanka.


Ĉe la lasta aperas bildo sur ambaŭ flankoj de la fontuko. La bildo estas la sama en returnita pozicio sur la dorsoflanko. En la historio aperis tia brodaĵo nur en King-dinastio (1644-1911), tamen, la koloro estis ununura siatempe kaj la desegno kaj tekniko estis simplaj. Venkinte multajn malfacilojn, la nunaj brodistinoj disvolvis la teknikon, tiel ke duflanka brodo fariĝis nova speco de brodarto kun tute aparta karaktero.

La diferenco de duflanka brodaĵo kompare kun la unuflanka troviĝas en tio ke ĉe la antaŭa nevideblaj estas la nodoj sur la dorso. La steboj ne povas esti interkrucitaj kaj devas esti rigore paralelaj tiel en la fronto kiel en la dorso, por ke la dorsa bildo

estu same neta kaj glata kiel tiu sur la fronta flanko. Kiam unu fadeno estas alkudrata, neniun nodo estas farita. Same tiel estas ĉe la fino. La finaĵoj estas kaŝitaj sub la stebaroj. En unu brodaĵo estas dek-miloj da fadenfinaĵoj, kiuj ĉiuj devas plene kovritaj nevideble. Kaj nefarado de nodoj ne devas permesi malstreĉiĝon de la alkudritaj fadenoj. En kreado de duflanka brodaĵo alta lerteco estas bezonata por ne enpiki en la fadenon sur la dorsa flanko kaj rigore precize paraleligi la stebojn sen kovro de unu stebo sur alia. Nur tiam oni povas ricevi netajn bildojn sur ambaŭ flankoj.

La duflanka brodaĵo *Kato kaj manto* estas kreita de la Suĝoŭ-a Broda Instituto por inkrustita sur solstara ekrano. Sur ĝi estas brodita manto preta elsalti el verda herbejo, kaj grizblanka kateto havanta felon kun densa kaj diktavola hararo staras petole antaŭ ĝi. La okuloj de la kateto plenaj de naiveco montras diafanecon kaj purecon. Ĝiaj du oreloj rekte staras. La kateto estas tiel vive figurita, kvazaŭ ĝi en ĉiu momento povus desalti el la bildo. La brodaĵo sukcese heredis kaj disvolvis la tradicion de Suĝoŭ-a brodarto en bela kaj viveca figurado de katetoj.

**En brodado, ĉe okazo de neceso oni nur dividas ordinaran silkan fadenon en 24 anstataŭ 12 fadenojn en antaŭaj tempoj.*



Katoj (Suĝoŭ-a brodaĵo)

Speciala Kudromaŝino

MA GINLI, membro de Vadian-komunumo de Nanjang-gubernio de Henan-provinco, akiris specialan kudromaŝinon manipulitan per mano. Oni laŭdis lian bonan servadon al la komunumanoj kaj samtempe ankaŭ laŭdis la Pekinan Kudromaŝinan Fabrikon, kiu fabrikis tiun ĉi maŝinon.

Hodiaŭ Ma Ginli estas 25-jara. Li ne estas tajloro, sed kial li bezonas specialan kudromaŝinon kaj ricevis laŭdon? Antaŭ naŭ jaroj liaj malsupraj membroj paraliziĝis, tial li ne plu povis partopreni en agrokultura laboro. Sub la zorgo de la kolektivo li vivis bone, sed li pensis ke kvankam liaj kruroj malboniĝis, tamen li povas per siaj manoj kudri vestojn por la komunumanoj, se li akiros taŭgan kudromaŝinon. Kaj per tio li povos kontribui al la agrokultura produktado. Sed de kie akiri tian kudromaŝinon?

En majo de 1972, li aŭdis de la radio ke la Pekina Kudromaŝina Fabriko kolektas opiniojn de la amasoj por plibonigi siajn produktaĵojn. Li do skribis leteron al la fabriko por konigi al ĝi sian deziron pri akiro de taŭga kudromaŝino.

Post duona monato, subite alvenis du nekonatoj al Ma Ginli. Ili estis maljuna laboristo Ma Ĉangŝun kaj teknikisto Taŭ Gjunjue de la menciita fabriko. Ili alvenis speciale por koni lian staturon kaj bezonon por projekti kudromaŝinon taŭgan por lia uzo. Ma Ginli kore ĝojiĝis kaj sentis neesprimeblan dankon.

Unu monaton poste, la teknikisto denove venis al la domo de Ma Ginli kun kesto. Li malfermis ĝin kaj aperis kudromaŝino taŭga por uzado de Ma Ginli surlite. Krome la teknikisto alportis ankaŭ senpiedan seĝon por uzado dum manipulado de la kudromaŝino. Ĝi estas provizita per molaj matracoj kaj la dekliveco de la dorsapogilo povas esti reguligita.

Tion vidinte Ma Ginli tre tre ĝojis. Li foje kaj refoje dankis la laboristojn pro ilia helpo kaj esprimis sian volon bone lerni de ilia spirito kaj lerte uzi la maŝinon por servi la komunumanojn. En la pasintaj kelkaj monatoj li jam faris kaj flikis pli ol 200 vestojn por la komunumanoj, kaj ricevis de la lastaj multajn laŭdojn pro sia servo.



Verda Dezerto

LA titolo de tiu ĉi artikolo eble vin mirigas, ke estas dezerto verda. Ĉar je mencio de dezerto ĝenerale oni pretervole imagas al si ruliĝantan sablon sur vasta dezertejo.

Jes, de mia infanaĝo mi jam vivadis sur dezerto, kie mi spertis ruliĝadon de flava sablo kaj la dezerta vidaĵo por ĉiam gravuriĝis en mia memoro! Ho ve, dezerto! Kiom da neesprimeblaj katastrofoj ĝi portis al ni, la popolo de la Interna Mongolio, en la pasintaj jarcentoj!

Sed hodiaŭ mi parolas pri reformo de dezerto en verdan oazon en la socialisma nova Ĉinio, tial mi prenis por mi la titolon "Verda dezerto".



VOJAĜO EN DEZERTO

Sur mapo de Ĉinio vi povas vidi en la altebenejo Ordos de nia norda limregiono dezertan areon. Ĝi estas la fame konata granda dezerto Maŭvusu.

Antaŭ pli ol dudek jaroj, mi vizitis tiun lokon. En tiu tempo, la regiono ĵus liberiĝis el sub la feŭda regado de la kuomintanga reakciularo kaj princoj kaj nobeloj kaj ankoraŭ ne malaperis en ĝi la dezerteco kaj mizereco postlasitaj de la malnova socio.

Dum tiu vojaĝo mi refoje vidis propraokule la tragikan sorton de la popolo en la dezerta regiono en la malnova socio.

Mi veturis sur kamelo ĉiutage en la senlima maro de sablo, la vasta flava etendaĵo kun neniom da herbo.

Foje kiam mi veturis survoje, abrupte min atakis ŝtormo. Tuŝite de vento la kviete kuŝanta dezerto tuj ŝanĝiĝis komplete. Ekboldis la tuta dezerto kaj eĉ la sablomontetoj kun alteco de 100 ĝis 200 metroj kvazaŭ ekhavis fabelajn krurojn kaj moviĝis al vi kun surdiga muĝado. En la aero, pli kaj pli densiĝis la flava sablo levita de la vento, tial la printempa suno perdis sian brilon.

En la sablovento mi povis nek malfermi la okulojn, nek levi la kapon; mi sentis ke sableroj senĉese penetris en miajn nazon, okulojn, orelojn kaj buŝon kaj mia spirado fariĝis malfacila. En la malhelo, mi ĉirkaŭbrakis la ĝibon de la kamelo kaj lasis ĝin iri laŭvole. Sed kiam pli kaj pli furioziĝis la vento, eĉ la kamelo, konata kiel "boato de dezerto", ekhezitis iri. Mi povis nur halti kaj atendi la forpason de la vento, prenante la surgenue kuŝantan kamelon kiel ŝirmilon...

Vespere, la vento iom post iom malfortiĝis. Nur tiam mi povis min tiri el profunda sablo kaj stariĝis por ĉirkaŭrigardi la sablan vastajon post la ventego — la mizere malmultaj arboj kaj herboj estis elradikitaj kaj forblovitaj neniu scias kien. La ĉirkaŭaĵo impresis min kvazaŭ mondo senviva.

La vojo jam estis glutita de la flava sablo kaj mi daŭrigis mian iradon sur la senvoja dezerto... Mi transrajdis multajn sablajn montetojn kaj iris mi ne scias kiom longan distancon. Subite la kamelo haltis kaj levadis siajn piedojn alterne sen antaŭenmoviĝo, malgraŭ pelado.

Ne vidante la kaŭzon, mi faris kelkajn paŝojn antaŭen por esploro. Ah! Mi venis sur la tegmenton de ies domo, rajdante sur la sablejo. La dorsmuro de la domo jam estis tute ensablita kaj ankaŭ la tegmento estis kovrita de dika tavolo da flava sablo. Tiu domo eble estos baldaŭ ensablita! Ĉirkaŭire mi descendis de la tegmento kaj deziris vidi la mastron, sed la pordo de la domo estis blokita de sablo. Mi formovis la sablon per miaj manoj, malfermis la pordon kaj vidis, ke sur la terlito kuŝas avino grave malsaniĝinta. Jam krepuskiĝis kaj estis malhele en la domo. “Kie estas via lampo?” mi demandis. “Mi bruligu ĝin por vi.” “De kie ni malriĉuloj povus akiri oleon por lampo?” mallaŭte diris la maljunulino. “De kvin jaroj mia domo jam ne vidis lamplumon!” Aŭdinte tion mi sentis kvazaŭ peza nokto falis sur mian koron!

Poste la avino diris al mi, ke ŝi servadis ĉe brutoposedanto kiel sklavinon dum 30 jaroj, sangspulis pro trolaciĝo kaj estis forpelita de la mastro kiam ŝi ne plu povis sin movi. Ŝi havis nur unu filon, kiu laboris ĉiutage por la brutoposedanto kaj povis porti hejmen vespere manĝaĵon apenaŭ sufiĉan por ilin vivteni. Je tio ŝia filo revenis. Li kunportis en la manoj kelkajn bulojn el sovaĝa legomo, herbosemoj kaj malmulte da maiza faruno.

Mi diris al la avino emocie, ke la dezerto Maŭvusu jam liberiĝis, kaj sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio ni starigos tie novan vivon kaj la dezerto fariĝos riĉa loko, kaj ŝi kaj miloj kaj miloj da aliaj malriĉuloj vivos feliĉan socialisman vivon.

Kvazaŭ aŭskultinte belan fabelon, la avino montris pli kaj pli brilajn okulojn. . .

Kiel arde la maljunulino sopiris al la bela nova vivo!



REVIZITO AL LA MALNOVA LOKO

Forpasis pli ol 20 jaroj je palpebrumo. Hodiaŭ mi denove venis al la dezerto Maŭvusu. Kiam mi

skribas tiun ĉi artikolon sidante en la oficejo de Vuŝenĝaŭ-komunumo en Maŭvusu-dezerto, la ĉirkaŭa vidaĵo jam tute aliĝis. Ekstere de la fenestro sterniĝas tapiŝo de herboj, densas arbaroj kaj ondas grenplantoj tie kie antaŭe ruliĝis flava sablo en furioza vento. . . formante pitoreskaĵon specialan en dezerto. Per siaj laboremaj manoj, la heroo popolo de Vuŝenĝaŭ beligis la vastan dezerton per verda vesto.

La popola komunumo Vuŝenĝaŭ estas fame konata en la Interna Mongolio kaj eĉ en la tuta Ĉinio. Ĝi estas nomata “Daĝaj en brutobreda regiono” kaj avangarda unuo en konstruado de tiu regiono. Sed en la malnova socio, ĝi estis mizerega kaj postiĝinta loko same kiel la aliaj lokoj en Maŭvusu-dezerto. Tiam la totala areo de Vuŝenĝaŭ estis 1,400 kvadrataj kilometroj kaj 54% de ĝi estis moviĝantaj sablomontetoj. Krome tie troviĝis ankaŭ akvujoj, malmolaj sablomontetoj kaj salalkalejoj. Nur trio de la stepo estis utiligebla kaj ĝi estis dividita de la grandaj kaj malgrandaj sablomontetoj en milon da malgrandaj paŝtejoj kun herboj malaltaj kaj maldensaj. Pli ol 70 procentoj de la brutoj estis posedataj de la brutoposedantoj kaj feŭdaj oficistoj, kiuj konsistigis nur malpli ol 5 procentojn de la loĝantaro, dum 95 procentoj de la paŝtistoj vivis mizere kiel mongola proverbo diris: “Ili havas nenian beston krom muŝo; ili havas nenan riĉaĵon krom polvo.”

Post la Liberiĝo, la vastaj amasoj de paŝtistoj suprenturniĝis en politiko. Post la revoluciaj movadoj de demokratia reformo kaj socialisma reformo, multe disvolviĝis la produktado kaj multe altiĝis la vivo de la popolo. Tamen la naturaj katastrofoj ankoraŭ estis tre seriozaj. En la komenca periodo, pro la ne sufiĉe grandaj kaj organizitaj fortoj de la kolektivo la penso ankoraŭ iagrade katenita de la tradiciaj rutinoj, oni ankoraŭ ne havis eblecon reformi la dezerton kaj konstrui la stepon, kaj la brutobredado daŭre restis en granda nestabileco.

Post la fondiĝo de la popola komunumo en 1958, sub la direktado de la ĝenerala linio de la Partio “streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie”, nombro da paŝtistoj kun kompartiano Baŭjiledaj, filino de malriĉa paŝtisto, kiel kondukanto elmetis la proponon fari batalon kontraŭ la dezerto kaj ricevis subtenon de la komunuma partia komitato kaj la vastaj amasoj de paŝtistoj.

La komunumo rapide organizis trupon por reformi la dezerton kaj ĝi ekmarŝis al la dezerto alte tenante ruĝajn flagojn.

Kiel ekscita momento ĝi estis! De multaj jaroj, la vasta dezerto jen dormis, jen ĝemis mallaŭte kaj jen ekmuĝis kaj tumultis sovaĝe. Sed ĉio ĉi tio estis konsiderata kiel agado laŭ la volo de dioj kaj ĉio sur la dezerto estis aranĝita de dioj, sekve do netuŝebla sed respektenda kaj kultenda. De kiom da jaroj kaj generacioj oni tiel vivadis! Sed hodiaŭ, la revolucia popolo de la socialisma nova Ĉinio nepre volas rompi la rutinaĵojn kaj katenojn, batali kontraŭ la dezerto, konstrui sur ĝi herboriĉajn paŝtejojn, fekundan kamparon kaj densajn arbarojn, ŝanĝi la nomadan produktadon kaj vivmanieron praktikatajn de la mongolaj paŝtistoj de antikveco kaj rompi la malnovan kutimon de bredado de brutoj depende de la naturaj kondiĉoj. Aparte kortuŝa estis tio, ke tiu senprecedenca iniciato sur la dezerto estis efektivigita sub la gvido de ordinara juna filino de malriĉa paŝtisto!

En la unua batalo kontraŭ la dezerto, oni tute ne sciis de kie komenci. Sur la dezerto kreskis speco de arbusto nomata sabloartemizio, kiu povas elteni sekecon kaj malvarmon kaj havas fortan vivopovon. La popolanoj de Vuŝenĝaŭ komencis planti sabloartemiziojn sur sablomontetoj. Ili alportis surdorse sabloartemiziojn de la loko je pli ol kvin kilometroj fore kaj zorgeme plantis ilin en flava sablo kvazaŭ alpinglus florojn sur kapo de knabino. Longajn vicojn de sabloartemizioj ili plantis sur sablomontetoj unu post alia kaj iom post iom ilin plenigis. Ĝoĝiĝis la loĝantoj sur la dezerto, kiuj neniam vidis tian spektaklon.

Sed tio estis nur la komenco de la reformado de la dezerto. La sabloartemizioj ĵus plantitaj estis tro malmultaj en la vasta dezerto. Ĉu ili povas vivi plue? Ĉu ili povas kontraŭstari sabloventon? Neniu estis certa pri tio... Kaj jen ekblovis ventego, sablo turniĝis tie kaj la plantitaj sabloartemizioj aŭ mortis kovrite de sablo aŭ estis elradikitaj de la ventego. Je la fino, nur tri el ili restis vivaj! La detruigo de la plantaĵoj ĉagrenis la komunumanojn. Iuj eĉ deprimiĝis kaj diris: "Ĉu oni povas reformi tian vastegan dezerton?"

Ĉu oni marŝu antaŭen spite al la malfaciloj aŭ submetiĝi al la fortegoj de la naturo kaj retiriĝi? La komunumanoj alfrontis severan provon.

Kune kun la amaso sub sia gvido Baŭjiledaj studis la verkon de Prezidanto Maŭ *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo*. Ŝi diris al la aliaj: "En la komenco ni ne havas sperton kaj sukcesis vivi nur tri sabloartemiziojn. Kvankam tri estas malmulte, tamen ni jam akiris tre grandan venkon! Tio montras, ke oni povas vivi plantaĵon sur la

dezerto kaj la dezerto estas reformebla. Se ni sukcesis vivi tri, do ni povos vivi 3,000, 30,000, 30,000,000... Por translokigi monton, la Malsaĝa Avo portis teron kaj ŝtonojn korbon post korbo, kaj en transformado de dezerto ni ne povos sukcesi en unu fojo de klopodo, ni devas penlaboradi ankaŭ kun la spirito de la Malsaĝa Avo daŭrigi la fosadon ĉiun tagon sen iometa ŝanceliĝo. Se nur ni havas firman revolucionan volon, ni certe povos transformi la dezerton en paŝtejon kun abundaj herboj."

La Vuŝenĝaŭ-anoj rigardis la lecionon de malvenko kaj sperton de sukceso aferoj same gravaj. Dum malvenko ili ne retiriĝis kaj kun sukceso ili plu antaŭenmarŝis. Kaj post peniga batalado en multaj jaroj la dezerto en Vuŝenĝaŭ iom post iom malgrandiĝis kaj la herbejo pligrandiĝis. Nun la 4,700 hektaroj da senherbaj sablomontetoj jam estis transformitaj en herbozajn bonajn paŝtejojn.

Ili provis planti ankaŭ poplojn, salikojn, ulmojn, betulojn, soforojn, cipresojn kaj aliajn altajn arbojn; kaj sukcesinte en tio ili jam komencis kulturi grandareajn forstojn kaj forstozonojn de tiaj arboj. En la pasintaj dekelkaj jaroj, ili fiksas pli ol 12,000 hektarojn da moviĝaj sablomontetoj per arbustoj kaj arbaroj en kombino kaj konstruis pli ol 3,000 hektarojn da sablofiksaĵoj kaj forstoj por ligno.

Forstumado jam fariĝis kutimo de la loĝantaro de Vuŝenĝaŭ, kaj ĉiujare en printempo kaj aŭtuno iras ĉe ili amasa movado de forstumado. Nun ĉiu familio havas siajn arbojn kaj ĉiu vilaĝo sian arbaron. Aparte menciinde estas, ke en la pasinteco oni povis vidi neniun pomon sur la dezerto Maŭvusu, sed nun ĉiu produkta grupo de Vuŝenĝaŭ-komunumo jam havas sian fruktan ĝardenon, kaj la paŝtistoj povas ĝui pomojn el sia propra kulturado.


Por reformi la dezerton, oni devas kreskigi herbojn, grenplantojn kaj arbojn. Sed tie blovdas forta sablovento kaj troviĝas multaj brutoj, kiuj ofte detruas la plantaĵojn.

Kiel solvi tiun kontraŭdiron? Per granda penlaborado, la popolanoj de Vuŝenĝaŭ starigis ĉirkaŭmurojn per adoboj kaj barilojn el salikaj branĉoj kaj konstruis en ili altproduktajn herbejojn, forstojn kaj kampojn. Laŭ nekompleta statistiko, en la lastaj kelkaj jaroj, Vuŝenĝaŭ konstruis pli ol 50 grandajn kaj malgrandajn tiajn kortojn kaj la totala longo de la ĉirkaŭmuroj atingis pli ol 250 kilometrojn. La fojno rikoltita en ili jam sufiĉas por breddi la havatajn brutojn; la rikoltita greno sufiĉas ne nur por kontentigi la bezonon de la breda-

taj brutoj, sed ankaŭ por plenumi 70 % de la bezono de la komunumanoj. Interne kaj ekstere de tiuj ĉirkaŭmuroj, oni plantis ĉirkaŭ 700,000 arbojn, kiuj formis grandan barilon kontraŭ sablovento kaj krome povas liveri grandan kvanton da ligno kaj manĝeblaj folioj por la brutoj. En ĉiu somero, floras buntaj floroj en kaj ekster ili kaj formas belan pejzaĝon.

La konstruado de herbejoj akcelis la rapidan disvolviĝon de la brutobreda produktado. La totala nombro de la bredataj brutoj de Vuŝenĝaŭ-komunumo estas je 4.8-oblo pli multe ol la 18,000 antaŭ la Liberiĝo. En la 12 jaroj de 1958 ĝis 1970, ĝi vendis 72,000 brutojn al la ŝtato, pli ol 155,000 pecojn da feloj kaj pli ol 461,000 kilogramojn da lano. Per tiuj produktaĵoj kun totala valoro de pli ol 3,148,000 juanoj ĝi forte subtenis la konstruadon de la ŝtato.

Menciante la suprajn ciferojn por klarigi la ŝanĝojn en la dezerta regiono de Vuŝenĝaŭ, mi tamen ne devas forgesi unu plej gravan ciferon, nome la supre diritaj grandaj sukcesoj estas atingitaj de relative malgranda popola komunumo sur la dezerto kun nur 1,064 laborkapablaj viroj kaj virinoj.



GAJAJ KANTOJ

La senĉesa firmiĝo kaj disvolviĝo de la kolektiva ekonomio konstante multigis la enspezon de la komunumanoj. Ni prenu la produktan grupon Vuŝenĝaŭ de tiu komunumo kiel ekzemplon. Nun ĉiuj ĝiaj familioj loĝas en brikaj domoj kun elektraj lampoj.

Vuŝenĝaŭ estas loĝpunkto sur la dezerto kun pejzaĝo aparte ĉarma. Vicoj post vicoj da densaj arboj ĉirkaŭas ĝin tiel ke oni ne povas klare vidi ĝin de malproksime, kvazaŭ ĝi estus knabino en verda gazo. Ĉirkaŭe de ĝi estas kultivejoj en ĉir-

kaŭmuro kaj murmuraj interkruciĝantaj riveretoj ĉiam tenas la humidecon de la tero. Dank' al la penlaborado de la komunumanoj, la antaŭe ruliĝantaj sablejoj estas katenataj de longaj vicoj de arbustoj; bovoj kaj ŝafoj arope paŝtiĝas en la verdaĵoj.

Vespere la komunumanoj finis sian laboron. En gaja nacia muziko mi iris sur straton de Vuŝenĝaŭ. Sub arbego kelkaj maljunuloj en elektrolampa lumo babilis pri novaĵoj kaj la revolucia situacio en kaj ekster la lando, trinkante laktan teon. Tiam eklumiĝis la elektraj lampoj en ĉiuj domoj tiel ke Vuŝenĝaŭ dronis en maro de lumoj.

Promenante mi eniris la korton de iu avino. La korto aspektas pura kaj bonorda kaj en ambaŭ flankoj de la pordo staras du kanadaj poploj kvazaŭ sentineloj. Ili rekte sin direktas al la ĉielo donante al mi impreson de vivpleneco.

Vidinte min la avino diris ĝoje: "Proverbo diras, ke birdoj multas en loko kie abundas akvo kaj herboj, kaj gastoj multas en familio kiu vivas gaje. Vi alvenas en tempo tre oportuna, bonvolu enveni kaj sidiĝi!"

En la malnova socio, la avino migradis pli ol 20 jarojn kiel almozulino sur la dezerto kaj edziniĝis nur post la Liberiĝo. Nun ŝia familio loĝas en norda domo kun kvin ĉambroj kaj flanke de ĝi staras du jurtoj.

Kiam mi eniris la domon, en la vasta ĉambro sidis dekkelkaj homoj gaje kantantaj kaj interbabilantaj. Iu junulino diris al mi, ke la traktoristo (filo de la avino) laŭtleĝos sian poemon kaj ke ankaŭ mi aŭskultu. Mi do sidiĝis kun plezuro.

La avino estis sin okupanta per regalado de la gastoj kaj de tempo al tempo aŭdigis serenon kaj feliĉan ridon.

Ho, la hela lamplumo kaj la feliĉa maljunulino nature memorigis al mi la pasintajn antaŭ pli ol 20 jaroj kaj la malforta ĝemado de la grave malsaniĝinta maljunulino denove eksonis ĉe miaj oreloj: "De kie ni malriĉuloj povus akiri oleon por lampo? De kvin jaroj mia domo jam ne vidis lamplumon. . ."

Kiel grandan diferencon mi trovis inter la pasinteco kaj la hodiaŭo, farinte komparon inter ili!



Ĉinaj Historiaj Restaĵoj en Parizo

La Ekspozicio de Historiaj Restaĵoj de la Ĉina Popola Respubliko estis oficiale okazigita de majo ĝis septembro de la kuranta jaro en Petit-palaco de Parizo. Dum la eksponado, ĝin vizitis ĉiutage pli ol 3,000 personoj. Parizaj ĵurnaloj laŭdis, ke ĝi estas “grandioza afero en la jaro 1973”. Oni diras, ke nur du el la ekspozicioj de historiaj restaĵoj montritaj en Petit-palaco ekde la komenca periodo de la kuranta jarcento havis pli ol 300,000 vizitantojn kaj unu el ili ĝuste estis la ĉina ekspozicio.

La ekspozicio ricevis grandan atenton de la ĉina kaj franca registaroj kaj ankaŭ fortan subtenon de la franca popolo. La inaŭguron persone prezidis Michel Jobert, ministro de eksterlandaj aferoj de Francio, kaj Maurice Druon, ĝia ministro de kulturaj aferoj. Kaj ĝin vizitis ankaŭ Pierre Messmer, ĉefministro de la franca registaro, Gaston Palewski, prezidanto de la Konstitucia Konsilantaro, kaj aliaj famaj personoj. Ankaŭ la ĉina registaro sendis delegacion estratan de Vang Jekiu, direktoro de la Ŝtata Administra Buroo de Arkeologiaj Aferoj, por partopreni en la inaŭguro kaj fari amikan vizitadon al Francio. La laborantoj de la Muzeo de Petit-palaco inkluzive de la direktorino faris plej grandan klopodon por tiu ĉi ekspozicio. Direktorino de la muzeo F-ino Cacan diris: “Ni rigardas la ĉinajn trezoraĵojn en Francio kiel francajn. Ni prizorgos tiujn trezoraĵojn kiel la plej belajn konservaĵojn en Petit-palaco.”

En Francio, la ekspozicio estis nomata ekspozicio de “ĉinaj artaj trezoroj”. Pli ol 40 ĵurnaloj kaj gazetoj publikigis artikolojn kaj eldonis specialajn numerojn pri la ekspozicio, en kiuj oni multe priskribis kaj alte taksis tiujn historiajn restaĵojn lerte kreitajn de la ĉina laboranta popolo en antikveco. Pri la galopanta bronza ĉevalo la ĵurnalo *La Mondo* skribis kun admiro: “Ekflugas la bronzo.” Aliaj artikoloj diras: La ĉinaj antikvaj porcelanaĵoj

karaktiziĝas per “eleganteco, rafineco kaj delikateco”, “ĝi (la ekspozicio) povas esti bonega enkonduko por studi la ĉinan arton”. *La Batalo* diris ke la ekspozicio estas “unu tre fruktodona rikolto de objektoj”, kaj “ĝi estas belbrilega ponto inter Ĉinio kaj Eŭropo — heredanto de Ateno kaj Romo”. Francaj gazetoj laŭdis ankaŭ la zorgon kaj protekton de Ĉinio al historiaj restaĵoj. En sia artikolo, direktoro de Cernuski-muzeo montris ke en Ĉinio “la kulturaj heredaĵoj estas riĉaĵoj de la popolo, kiuj estas kreitaj de la popolo kaj apartenas al ĝi”, tial “konservi la naciajn heredaĵojn jam fariĝis devo de ĉiu ĉina civitano”.

La ekspozicion vizitis plurfoje iuj rigardantoj, inter kiuj estis S-ino Denes, instruistino de la ĉina lingvo de la Pariza Vincenne-universitato. Ŝi diris, ke ŝi kaj ŝiaj lernantoj opinias, ke tiu ekspozicio “estas tre viva leciono pri la ĉina historio”.

Bronza monujo kun ŝpinaj kaj teksaj homfiguroj de la Okcidenta Han-dinastio (de 206-a a.K. ĝis 24-a p. K), elterigita en Ginning de Junnan-provinco de nia lando



Ŝi montris ankaŭ, ke iuj maltrankvilis ke la kultura revolucio de Ĉinio eble detruis la ĉinan antikvan kulturon, la ekspozicio nuligis tiun dubon. La ĉinaj historiaj restaĵoj estis ne nur varme bonvenigataj de la franca popolo sed ankaŭ laŭdataj de rigardantoj de aliaj landoj de Eŭropo kaj amerikaj landoj. 40 rigardantoj estis venintaj de Usono al Parizo speciale por la ekspozicio.

Ne estis hazarde, ke la franca popolo havis tiel grandan intereson al la ĉina ekspozicio de historiaj restaĵoj. Frue en la 17-a jarcento, la ĉinaj porcelanaĵoj, lakaĵoj kaj silkaĵoj jam renomiĝis tra Francio. La ekspozicio montris, ke la amikeco inter la ĉina kaj franca popoloj estas longdaŭra kaj sincera, kaj ĝi certe disvolviĝos tagon post tago kun la senĉesa pliigo de kontakto inter ambaŭ landoj!

Filadelfia Orkestra Grupo en Ĉinio

La Filadelfia Orkestra Grupo de Usono unuafoje veturis trans oceano kaj kunportis profundan amikecon de la usona popolo al la ĉina.

La orkestra grupo havas historion de 73 jaroj kaj faris kontribuon por disvastigo de simfonio. Sub la flegado de la fama direktisto Eugene Ormandy kaj lia antaŭulo, la orkestra grupo formis iom post iom sian originalan ludstilon de grandiozeco, entuziasmo, kun abunda sonoreco kaj brila tembro.

S-ro Eugene Ormandy direktis la Filadelfian Orkestran Grupon jam 37 jarojn. Kun aĝo de 73 jaroj, li ankoraŭ estas energioplena. La ludistoj de la orkestra grupo plejparte estas artistoj kun multjara ludsperto kaj profunda instruiteco de muziko. En tiu vizitado ili ludis por ni verkojn de eŭropaj klasikaj, modernaj kaj nuntempaj komponistoj, kaj ankaŭ verkojn de la usonaj komponistoj Haris, S. Barber kaj W. Shuman. Al tiuj verkoj malsamaj en epoko, nacieco kaj stilo, E. Ormandy faris malsaman rekreadon, kio plene montris lian artan talenton kaj direktan arton. Iliaj fervoraj ludado kaj amikeco esprimata per ilia ludo donis profundan impreson al la ĉinaj aŭskultantoj.

Filadelfio estis la unua ĉefurbo de Usono post ĝia sendependiĝo. Kaj ankaŭ la Filadelfia Orkestra Grupo kreskanta en tiu urbo havas sian gloran historion. En la jaro 1940, dum la Kontraŭjapana Rezistmilito kondukita de la ĉina popolo, S-ro Eugene Ormandy kun forta sento de justeco persone entreprenis prezentadon por kolekti monon por subteni la kuracan laboron de D-ro Norman Bethune kaj la Okavoja Armeo. En la jaro 1942, ili aranĝis koncerton por montri simpatian kaj

Direktisto Eugene Ormandy kaj Filadelfia Orkestra Grupo



doni subtenon al la sovetunia popolo en ĝia naci-defenda milito kontraŭ faŝismo.

S-ro Eugene Ormandy kaj ĉiuj aliaj artistoj de la Filadelfia Orkestra Grupo havas grandan entuziasmon al la fortepiana konĉerto *La Flava Rivero* — muzikaĵo priskribanta la naciliberigan batalon de nia popolo. Tiun konĉerton ili publike prezentis jam en Usono antaŭ veturo al Ĉinio, kaj post veno al Pekino, ili faris provludon kune kun la ĉina fortepianisto Jin Ĉengĝong. Kiam la ĉinaj kaj usonaj artistoj unuafoje kunludis la konĉerton, la forta kaj subluma fortepiano kaj entuziasma kaj vigla orkestro agordiĝis unu kun la alia, kaj tio multe emociis la tutan aŭskultantaron. La unuafoja sukcesa kunludo de la ĉinaj kaj usonaj artistoj montris profundan amikecon inter la du popoloj.

En la koncerto, Jin Ĉengĝong ludis ankaŭ la usonan pianan pecon *Domo sur la Paŝtejo*. Per dolĉaj tonoj kaj delikata traktado, li reaperigis antaŭ la okuloj de la aŭskultantoj kvietan paŝtejan pejzaĝon en la norda Usono. Kaj sub arda bisado, S-ro Eugene Ormandy direktis la orkestron ludi la de ili mem adoptitan ĉinan nordŝenhi-an popol-kanton *Marŝo de Laboristoj kaj Kamparanoj*, per kio ĝi rikoltis varman aplaŭdon de la ĉinaj aŭskultantoj.

Dum la restado en Pekino kaj Ŝanhajo, la usonaj artistoj aprezis ankaŭ ĉinajn klasikajn, popolajn kaj modernajn revoluciajn muzikaĵojn, vizitis la Centran Filharmonian Orkestron kaj la Ŝanhajan Filharmonian Orkestron. La ĉinaj kaj usonaj artistoj donacis muzikilojn, sondiskojn kaj muzikajn kajerojn unu al alia kaj varme interŝanĝis inter si sperton pri ludado. Dank' al ilia vizitado la amikeco kaj interkompreno inter la popoloj kaj muzikistoj de ambaŭ landoj estis plifortigitaj.

En la Tagoj en Aŭstralio

En junio kaj julio de la kuranta jaro, la Ĉina Amika Vizita Grupo venis al Aŭstralio por fari amikan vizitadon. En la tago, kiam la grupo atingis Kanberon, ĝi jam ricevis varman akcepton de la aŭstralia popolo kaj sentis varman amikecon. Tie, la grupanoj refoje renkontiĝis kun multaj malnovaj amikoj kiuj iam vizitis Ĉinion kaj ankaŭ interkonatiĝis kun multaj novaj amikoj.

En Melburno, la dua granda urbo de Aŭstralio, stariĝis Aŭstralia-Ĉina Asocio jam en la dua jaro

post la fondiĝo de la nova Ĉinio. En la pasintaj 23 jaroj, la tieaj amikoj faris multajn laborojn por akceli la amikecon kaj interkomprenon inter la popoloj de ambaŭ landoj. La tutlanda prezidanto de la Aŭstralia-Ĉina Asocio Dr. Geoffrey Stillwell diris al la vizita grupo: “Ni bonvenigas vin tutkore!” Tian sinceran amikecon profunde sentis la grupo dum sia vizitado.

Antaŭ nelonge aŭstralia amiko en la antaŭurbo de Melburno N. Sullivan vizitis Ĉinion kun sia edzino kiel membro de la Delegacio de Aŭstralia-Ĉina Asocio. Post reveno al sia patrolando, li faris raporton pri Ĉinio por pli ol 40 fojoj kaj lia edzino ankoraŭ projekciis lumbildojn pri la nova Ĉinio. Kaj kiam li informiĝis de televido, ke la ĉina grupo jam atingis Melburnon, li rapidis de kelkcent kilometroj fore veturigante sian aŭton por intervidiĝi kun la ĉinaj gastoj. Je la renkontiĝo la malnovaj amikoj pleniĝis de aparte varma sento. Antaŭ dek jaroj la preskaŭ 60-jara Bert James en la urbo Newcastle estis vicprezidanto de la filio de la Aŭstralia-Ĉina Asocio en Nova Suda Wales. La starigo de diplomataj rilatoj inter Aŭstralio kaj Ĉinio multe ĝojigis la maljunulon, ke li ne povis bone dormi en pluraj noktoj. Antaŭ ol nia grupo atingis Newcastle, li persone kaptis multajn fiŝojn. En la sekvanta tago li invitis la grupon al bankedo kaj emocie diris al la ĉinaj amikoj: “Jam 23 jarojn mi atendis vin!”

Tasmanio estas insula distrikto plej suda de Aŭstralio. La insulanoj varme kaj amike regalis la malproksimajn gastojn kaj tre volis koni la novan Ĉinion. Kiam la vizita grupo atingis la nordan urbon de tiu ĉi insulo Launceston, multaj homoj jam atendis ĝin en la hotelo, kie la ĉinaj gastoj estis loĝontaj. Junaj geedzoj Dawson speciale rapidis de malproksima urbeto Strong 300 km. fore por viziti la ĉinajn amikojn. La edzo estas laboristo. Li akumulis al si kvar feriojn en la pasintaj du semajnoj por intervidiĝi kun la ĉinaj gastoj. Tio ege kortuŝis la ĉinajn gastojn.

Apudmara urbo Hobart sude en la insulo Tasmanio estas ĉefurbo de la nomita distrikto. Tie, multaj aŭstraliaj amikoj entuziasme atendis la ĉinajn gastojn, inter kiuj troviĝis la tuta familio de universitata profesoro B. Johnson. Li emocie diris prenante la manon de ĉina gasto: “Ni kore bonvenigas vin, malproksimajn amikojn! Delonge jam devas komenciĝi amika kontaktado inter ni!” Li varme invitis la grupon al sia domo kaj fojrefoje tostis: “Prosperon al la nova Ĉinio!”

Venka Fermiĝo de la Kvara Konferenco de Ŝtataj kaj Registaraj Ĉefoj de Nealiancitraj Landoj

EN septembro ĉijare okazis en Alĝero la Kvara Konferenco de Ŝtataj kaj Registaraj Ĉefoj de Nealiancitraj Landoj. La kvintaga konferenco venke fermiĝis en atmosfero de unuiĝo kaj batalo por oponi kontraŭ imperiismo, koloniismo kaj novkoloniismo kaj hegemonio de potencoj. Ĝi estis kunveno senprecedence grandskala en la historio de la movado de nealianciĝo.

Depost la Tria Konferenco de Ŝtataj kaj Registaraj Ĉefoj de Nealiancitraj Landoj en 1970, la internacia situacio pluapasa disvolviĝis en la direkto favora al la diverslandaj popoloj, sed malfavora al imperiismo. Nun la popoloj de Azio, Afriko, Latinameriko kaj aliaj partoj de la mondo pli vaste unuiĝas kaj faras senŝanceliĝan batalon por akiri kaj defendi nacian sendependecon, protekti ŝtatan suverenecon kaj oponi kontraŭ agreso, renverso, interveno kaj tiranado fare de imperiismo, koloniismo kaj superpotencoj, kaj en tio ili gajnis grandajn venkojn. En la internaciaj aferoj la landoj de la tria mondo ludas ĉiam pli gravan rolon.

Nun la mondo sin trovas en intensa tumultado. La du superpotencoj konkuras en lukto por monda hegemonio, kio intensigas streĉecon de la internacia situacio kaj minacas la sendependecon kaj sekurecon de la malgrandaj kaj mezgrandaj landoj. La popoloj de la tria mondo iom post iom komprenis el sia propra sperto, ke ambaŭ superpotencoj estas imperiismaj landoj kaj iliaj komunaj malamikoj. Se la malgrandaj kaj mezgrandaj landoj ne firme batalas kontraŭ hegemoniismo kaj potenco-politiko de la superpotencoj, ili denove falos en ilian novkoloniisman kaptilon. Komenciĝinta en la sesdekaj jaroj, la movado de nealianciĝo disvolviĝas kaj fortikiĝas ĝuste en la batala ŝtormo de la tria mondo kontraŭ hegemoniismo de la du superpotencoj.

La alĝera konferenco estis senprecedenca ne nur en la nombro de partoprenintaj landoj, sed ankaŭ en la regiona reprezentado. En 1961, kiam okazis la Unua Konferenco de Ĉefoj de Nealiancitraj Landoj, ĝin partoprenis nur 25 landoj. Sed ĉijare la konferencon ĉeestis ŝtataj kaj registaraj ĉefoj kaj reprezentantoj de 75 landoj, observantoj de 10 landoj, gastoj el 3 landoj kaj reprezentantoj de 16 organizoj de naciliberiga movado. Tiu fakto montris, ke prospere disvolviĝas la batalo de nealiancitraj landoj kontraŭ imperiismo, koloniismo kaj hegemoniismo, kaj ke kreskas la fortoj de la tria mondo.

En la konferenco la ŝtataj kaj registaraj ĉefoj kaj reprezentantoj de diversaj landoj faris inter si diskutadon pri la nuna monda situacio kaj siaj alfrontataj taskoj. La konferenco aprobis politikan deklaron, ekonomian deklaron kaj serion da aliaj gravaj dokumentoj. La ĉeestantoj postulis “nestarigon de influa sfero”, “forigon de fremdlandaj militaj bazoj”, “retiron de fremdlandaj okupantaj trupoj”, “malpermeson al militaj ŝipoj de la potencoj tirani en Mediteraneo kaj oceanoj”, kaj montris tion ke “malriĉaj landoj unuiĝu”, “faligu imperiismon, koloniismon, rasismon, cionismon kaj hegemoniismon”. La lanĉpinto de ilia batalo direktas rekte al la du superpotencoj. La konferenco esprimis la volon kaj deziron de la popoloj de la tria mondo.

La konferenca deklario solene diras: la diversaj landoj de la tria mondo devas “firmigi sian sendependecon per efika uzado de ŝtata suvereneco kontraŭ hegemonio, t.e. rifuzi sklavigon kaj dependecon en ĉia ajn formo, ĉian ajn intervenon kaj preforton, ĉu politikan, ekonomian aŭ militan”. La deklario opinias, ke la nealiancitraj landoj

devas partopreni en la internaciaj aferoj surbaze de egaleco kaj surŝultrigi sian tutan internacian devon.

La konferenco indigne kondamnis la krimojn de imperiismo, koloniismo kaj novkoloniismo, kaj varme aplaŭdis la grandajn venkojn de la aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj popoloj en ilia justa batalo. Samdek Norodom Sihanuk, ŝtatestro de Kamboĝo, kaj Nguyen Huu Tho, prezidanto de la Konsilista Komitato de la Provizora Revolucia Registaro de la Respubliko de Suda Vjetnamio, partoprenis en la konferenco kaj ricevis varman bonvenigon. La konferenco klare deklaris, ke “la sola leĝa registaro de Kamboĝo estas la Reĝlanda Registaro de Nacia Unuiĝo de Kamboĝo gvidata de la ŝtatestro Samdek Norodom Sihanuk”. La konferenco alvokis, ke la nealiancitaj landoj “donu diplomatian subtenon al la Provizora Revolucia Registaro de la Respubliko de Suda Vjetnamio — la sola kaj vera reprezentanto de la sudvjetnama popolo”. La landoj partoprenantaj en la konferenco esprimis sian subtenon al la justa batalo de la vjetnama, laosa kaj kamboĝa popoloj, al la batalo de la korea popolo por sendependa kaj paca unuiĝo de la patrolando, al la batalo de la palestina kaj arabaj popoloj

kontraŭ izraela cionismo, al la batalo de la afrikaj popoloj kontraŭ koloniismo kaj rasismo, al la batalo de la latinamerikaj popoloj kontraŭ imperiismo kaj koloniismo, al la proponoj pri Mediteraneo kaj la Hinda Oceano kiel pacaj regionoj kaj al la startpunkto de multaj marbordaj landoj pri 200-mar-mejla ŝtata administra zono. Ĉio ĉi tio vivece enkorpigis la batalan volon de unuiĝo de la landoj kaj popoloj de la tria mondo.


La “ekonomia deklaro” kaj aliaj dokumentoj aprobitaj de la konferenco kondamnis, ke imperiismo, koloniismo kaj novkoloniismo monopolas internaciajn ekonomiajn aferojn, transmetas sian ekonomian krizon sur aliajn, prirabas kaj ekspluatas disvolviĝantajn landojn, pere de valuto, dogano, komerco kaj aliaj rimedoj. La konferenco emfaze montris, ke la landoj de la tria mondo devas ĉefe sin apogi sur la fortoj de la popolo kaj sur la unuiĝo kaj kunlaboro inter diversaj landoj por disvolvi naciajn ekonomion kaj kulturon kaj firmigis la nacian sendependecon. Tio esprimis la firman decidon de la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko por sin liberigi de fremdlanda superregoj kaj ŝanĝi la postiĝintan kaj malriĉan fizionomion.

En la kunvenejo



La sukcesoj de la konferenco estas gajnitaj en la batalo kontraŭ interveno kaj subfosa intrigo fare de superpotenco. Antaŭ la kunvoko de la konferenco, iu superpotenco multnombre sendis registarajn oficistojn al multaj landoj por persvado kaj donis preforton al la mastrolando de la konferenco, intencante rampi en la konferencon kiel "observanto". Post kiam tiu absurda postulo estis rifuzita, ĝi skribis leteron por minaco. La publikiĝo de tiu letero kun alta premo estigis kondamnon de mondaj publikaj opinioj kaj kaŭzis indignon de

Samdek Norodom Sihanuk faras paroladon en la konferenco.



La Delegacio de la Provizora Revolucia Registaro de la Respubliko de Suda Vjetnamio estrata de Prezidanto Nguyen Huu Tho



ĉefoj de multaj landoj en la konferenco. Ili montris, ke per tia maniero la leteroverkinto intencas meti la konferencon sub siajn influon kaj superregon, kaj lia celo direktas nur por eviti kondamnon de la konferenco al hegemoniismo. Tiu superpotenco kovis alian intrigon tuj post la malvenko de la unua. Dum la okazo de konferenco ĝi sendis homojn en la konferencon por fabriki malpacigon kaj levi disputon, sed la artifikoj fine fariĝis ridindaĵoj kaj refoje malkaŝis ĝian malbelan vizaĝon timi kaj malami la movadon de nealianciĝo.

La kvara konferenco estis kunjuro de unuiĝo kaj batalo de multaj mezgrandaj kaj malgrandaj landoj. Post kiam la konferenco venkis la subfosadon, minacon kaj obstrukcadon fare de la superpotenco en kaj ekster la konferenco, la politika orientado de la movado de nealianciĝo pli klariĝis kaj pli firmiĝis en batalo kontraŭ imperiismo, koloniismo, potenco-politiko kaj por defendi nacian sendependecon kaj ŝtatan suverenecon.

Nun, landoj volas sendependiĝon, nacioj liberiĝon kaj la popolo revolucion, tio jam fariĝis nerezistebla historia toronto. La justaj bataloj de la popoloj de la tria mondo kaj Eŭropo, Norda Ameriko kaj Oceanio subtenas kaj respondas unu al alia. La internacia situacio estas, ke "enture muĝas vento, aŭgurante montpluvegon". La du superpotencoj renkontis malfacilojn en kaj ekster-landajn kaj sin trovas, sub la atako de la monda kontraŭimperiisma revolucia ŝtormo, en senelirejo, kiel la verso diras, "Floroj falas for, nenion oni povas fari". Ilia ambicia intenco laŭplaĉe aranĝi la sorton de la triamondaj kaj aliaj landoj de la mondo estas absolute nerealigebla.

Ĉinio estas socialisma lando en disvolviĝo kaj apartenas al la tria mondo. La ĉina popolo formis profundan amikecon kun la aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj popoloj en la longdaŭra komuna batalo. Ni firme subtenas la batalon de la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko kontraŭ imperiismo, koloniismo kaj novkoloniismo kaj hegemoniismo de la superpotencoj, kaj firme subtenas la nealiancitajn landojn en ilia efektiviĝo de la politikoj de paco, neŭtraleco kaj nealianciĝo. Ni konvinkiĝis, ke la ŝtatoj kaj popoloj de la tria mondo certe povos akiri pli grandajn venkojn en la batalo kontraŭ imperiismo, koloniismo kaj hegemoniismo, sin apogante sur la propraj fortoj, persistante en batalo, tenante singardemon kaj plifortigante siajn unuiĝon kaj defendon!



La Taĝikoj

LA taĝikoj estas unu el niaj nacimalplimulto de antikveco, kun 15,000 loĝantoj, el kiuj 60% loĝas koncentre en la Taŝkorgan-a Taĝika Aŭtonoma Gubernio, kaj la ceteraj dise loĝas en la najbaraj gubernioj Mekit, Jarkent, Jeĉeng kaj Buma, en la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono.

La taĝikoj parolas la orient-persan lingvon apartenantan al la hind-eŭropa lingvo-familio. Pro longtempa intima kontaktado kun la ujgura kaj ĥalhaza popoloj, ĝia lingvo ne nur estas multe influita, ĝi eĉ uzas ujguran skriblingvon kaj multaj taĝikoj parolas ankaŭ la ujguran lingvon. De Tang-dinastio (618-907) ĝis nun, la regiono loĝata de la taĝika popolo ĉiam konservis intiman interrilaton kun la centra registaro de nia lando en politiko, ekonomio kaj kulturo.

Taŝkorgan signifas en la Taĝika lingvo “ŝtonan citadelon”, kaj ĝi estas ne nur la pordo de suda Hingiang, sed ankaŭ grava loko en nia okcidenta limo. Taĝikoj tie loĝantaj de generacioj al generacioj havas gloran historion en defendo de la limo de la patrolando sen timo al ĉia superforto.

Sub la tero de Taŝkorgan kuŝas riĉaj minoj de fero, plumbo, kupro, oro, alumino, glimo, kristalo, asbesto k.a. Kaj en ĝiaj montvaloj ĉ. 3,000 metrojn altaj super la marnivelo dislokigis fekundaj kampoj kaj vastaj paŝtejoj. Taĝikoj ĉiuprintempe semas sekalon, tritikon, pizon kaj aliajn plantojn, frusomere iras paŝti brutojn sur altaj montoj, kaj aŭtune revenas por rikolti kulturaĵojn kaj pasigi vintron, tiel daŭrigante la vivon duonmigran kaj duonfiksloĝan.

Antaŭ la Liberiĝo, en tiu ĉi malproksima, malvarma kaj postiĝinta montregiono, la regado kaj subpremado fare de la propraganta feŭda reganta kliko kaj la reakcia supera tavolo de religio pezis sur la kapo de la taĝika popolo kvazaŭ monto. Riĉaj paŝtmastroj monopole okupis paŝtejojn, fekundajn kampojn kaj posedis grandajn nombrojn

da gruntbovoj, kameloj, ŝafoj kaj ĉevaloj. Dum la senhavaj paŝtistoj estis dungitaj paŝti por la mastroj. La malriĉaj taĝikaj kamparanoj en Mekit, Jarkent, Jeĉeng suferis kruelan ekspluatadon per terrento, akvopago kaj diversaj pezaj impostoj. Precipe en la periodo de 1947 ĝis 1949, la agonie baraktantaj kuomintangaj reakciuloj faris frenezan rabadon al la taĝika popolo, perforte devigante la paŝtistojn ĉiujare pagi tributon el pli ol 3,000 ŝafoj kaj 25,000 kg. da brulfojno. Por fari huferojn la kuomintangaj trupoj forportis ĉion feran, tiel ke la taĝikaj kamparanoj perdis siajn instrumentojn kaj devis plugi teron per kornoj de sovaĝaj kaproj.

En septembro de 1949, Hingiang estis liberigita. Sub direktado de la politikoj de la Partio pri nacieco, la diversnaciecaj popolanoj de Hingiang ĝuas egalrajtecon en la granda multnacieca familio de la unuigita patrolando, tiel la taĝika popolo ekhavis novan vivon. En septembro de 1954, fondiĝis Taŝkorgan-a Taĝika Aŭtonoma Gubernio. En la lastaj dudek jaroj, rapide kreskis la taĝikaj kadroj, nun pli ol 80 procentoj de la funkciuloj de la aŭtonoma gubernio kaj fabrikoj, minejoj, lernejoj kaj hospitaloj estas taĝikoj.

Post la movadoj de demokratia reformo, socialisma reformo kaj popola komunumigo, precipe post la Granda Proleta Kultura Revolucio, la socialisma kolektiva ekonomio de la taĝika popolo senĉese disvolviĝis kaj plifortiĝis, kaj la agrikultura kaj paŝta produkto kreskis grandmezure. En la komenco post la Liberiĝo, en la tuta gubernio de Taŝkorgan restis nur 27,000 brutoj, t.e. du brutoj por ĉiu homo, kaj la totala produktokvanto de greno estis nur 580,000 kg., t.e. ĉirkaŭ 55 kg. pokape. Dum en la jaro 1972, la totalaj kvantoj de brutoj kaj grenoprodukto ses-obliĝis de tiuj en la jaro 1949 respektive, tiel ke la tuta gubernio havas grenon kaj furagon en superfluo. La ŝafo nomata Dunbaŝi kun granda vosto uzata por viando kaj graso, kiun ili bredas, pezas pli ol 100 kg. Ĝi fariĝis fama speco de ŝafoj en Hingiang.




Taĝika lernantino Dalajti kaj ŝia kunlernanto Kadi-er

Por ŝanĝi la duonmigran vivon de la vastaj paŝtistaj amasoj kaj faciligi la disvolvado de produkto, la aŭtonoma gubernio, en la disvolvado de brutobredado, entreprenas agrikulturan bazan konstruadon. Tiamaniere, en la jaro 1972, oni disvastigis la areon de agroj de la tuta gubernio je trioblo kompare kun

tiu en la jaro de la Liberiĝo, kaj la areo de maŝinpluigitaj agroj atingis 40 procentojn de la totala areo de agroj. Plejparto de la komunumoj kaj produktaj brigadoj ĝenerale starigis por si veterinaran stacion kaj edukis por si taĝikajn veterinarojn kaj agrikulturajn teknikistojn. Taŝkorgan, kiu antaŭe provizis sin per hufoferoj el aliaj lokoj, nun jam starigis proprajn malgrandajn hidroelektrejojn, maŝinriparejojn, fel- kaj lan-prilaborejojn.

Antaŭ la Liberiĝo, Taŝkorgan estis barita de vico post vico da altaj montoj. Tio malhelpis la evoluon de la loko. De multaj generacioj, la taĝika popolo sopiris al rompo de la baro de altaj montoj. Nun la deziro jam realiĝis. En la jaro 1958, sub la helpado de trupoj de ĈPLA, oni konstruis ŝoseon inter Taŝkorgan kaj Kaŝgar. Ŝoseoj estis konstruitaj ankaŭ inter la plejparto de ĝiaj komunumoj. Tio ne nur ŝanĝis la fermecon de la regiono, prosperigis la ekonomion, sed ankaŭ stimulis la interŝanĝon de varoj kaj produktadon.

La taĝika popolo fiere nomas Taŝkorgan, la hejmlokon rekonstruitan post la Liberiĝo, Perlo sur Pamiro-altebenaĵo. La nova urbo nun havas larĝajn stratojn, orde vicitajn domarojn, novajn oficejojn, bankon, poŝtejojn, magazenojn, lernejojn, hospitalojn, fabrikojn kaj meteorostacion, tiel ke la antikva Taŝkorgan nun troviĝas en prospero. Tiu antikva ŝtona citadelo jam fariĝis ŝtala citadelo de nia lando kontraŭ imperiismo kaj reviziismo.



BONE EFIKAS DRENA KONSTRUAĴO

Finkonstruiĝis kaj bone efikas la akvo-utiliga konstruaĵo norde de la rivero Hangiang de Hubej-provinco, kiu povas garantii riĉan rikolton de 130,000 hektaroj da agro malgraŭ trosekeco aŭ troabundo de pluvo.

La konstruaĵo ludas plenan rolon super la riveroj kaj lagoj en areo de kvin gubernioj norde de Hangiang-rivero. La kons-

truaĵo inkluzivas kanalon Hanbej, kiu estas 110 kilometrojn longa, 10 metrojn profunda kaj 220-750 metrojn larĝa, akvokondukan kluzon, du grandajn elektrajn drenstaciojn, grandan aŭtovojan ponton kaj aliajn aldonaĵojn. Kaj la koncernaj gubernioj, komunumoj kaj brigadoj ankaŭ fosis 48 kanaletojn kaj konstruis 78 drenajn kaj irigaciajn kluzojn. Nun tiuj konstruaĵoj jam efike funkcias. La areo de kampoj de tri gubernioj, kiuj donas riĉan rikolton spite al sekegeco aŭ troabundo de pluvo jam disvastiĝis je ĉ. 66,666 hektaroj kompare kun tiu de 1969. Ankaŭ la areo de rizkampoj de dufojaj plantadoj en Hanbej senĉese grandiĝis kaj atingis 66,666 hektarojn en la pasinta jaro, t. e. pli ol duoblo de tiu antaŭ la jaro 1969.

Pri la “Tagkajero en Prizono”, Poemaro Verkita de Prezidanto Ho Chi Minh

LEGANTE la poemaron de la granda gvidanto de la vjetnama popolo Prezidanto Ho Chi Minh, mi sentas profunde ke la versaĵoj en la kolekto estas vere perloj fontantaj el la vasta brusto de granda revoluciisto. Ili estas trezoro de la moderna revolucia literaturo ne nur de la vjetnama popolo, sed ankaŭ de la ĉina, precipe pro tio, ke ili estis skribitaj en la ĉina lingvo.

Por revolucia gvidanto, poemoverkado prezentas nur unu aspekton de lia aktivado, kaj cetere ne ĉefan. Tamen, estas eble pere de unu aspekto vidi lian tutan personecon. Tiuj poemoj brile spegulas la sublimecon de tiu ĉi granda gvidanto kaj la batalspiriton de la vjetnama popolo. Dum la lastaj dekoj da jaroj, la vjetnama popolo, sub la sinsekva tretado de pluraj ferocaj imperiismoj kaj koloniismoj, neniam ĉesigis sian batalon kontraŭ mallumo por strebi al lumo. Antaŭ la buĉado kaj torturado de reakciuloj en- kaj ekster-landaj, ili ĉiam konservas en si firman fidon pri venko kaj obstinan batalspiriton. La poemaro de Prezidanto Ho ja resume kaj figure montris ĉi tion.

Tiuj versaĵoj estis verkitaj de la aŭtoro en prizono, Guanghi, Ĉinio, dum la jaroj 1942 kaj 1943. Tiam, la revolucia afero de la ĉina kaj vjetnama popoloj troviĝis en tre malfacila etapo. Imperiismaj agresantoj arogante tiranis ĉie en niaj teritorioj, kaj la respektivaj enlandaj reakciuloj faris kruelan subpremado al la patriotoj de niaj du landoj. Kun alta patriotismo kaj internaciismo, Prezidanto Ho tiam aktive sin ĵetis en la komunan batalon de la ĉina kaj vjetnama popoloj, kaj same kiel multaj ĉinaj revoluciuloj, li trafis frenezan persekutadon de kuomintangaj reakciuloj kaj estis arestita kaj enkarcerigita en nia Guanghi-provinco je aŭgusto de 1942. Dum mallibereco de pli ol unu jaro, li sinsekve loĝis en 18 diversaj malliberejoj. En la vivo malsata, malvarma kaj kruela tie kaj sur la longa vojo de migrado en malcerteco, li surpaperigis ĉion viditan aŭ aŭditan, kiu lin impresis, kaj la indignojn, je kiuj plenis lia koro. En iuj versaĵoj



li enverŝis siajn sopirojn kaj atendojn, kiujn li havis por siaj patrolando kaj popolo multe suferantaj, en aliaj li akuzis kaj mokis la kruelecon kaj tiranaĵojn de la reakciuloj, sed, tamen, ĉiuj estas ĉiam saturitaj per revolucia optimismo.

La unua poemo de la poemaro jam kantas en altesvinga tono:

*Ja estas via korpo en prizono
Sed menso via super ĝia prono.
Por sukcesigi la grandentreprenon
Vi gardu la moralon en statbono.**

Legante tiujn versojn, oni povas facile imagi al si ke la verkisto tiam heroe eniras en la karceron kun alte levita kapo, rigardante la reakciulojn kiel nenion.

La obskureco de la malliberejo en la malnova socio estas bone konata de ĉiuj. En la nehoma vivo, kiel montrita en la versoj “‘buljon’ unika tro malplena la ventron lasas” kaj “aŭtuna nokto sen matraco nek kovrilo”, aŭdiĝas tamen jenaj kantoj:

*En fundo de l' prizono, oni ĝuas la obskuron,
Sed lumo antaŭ la okuloj jam radias miriada.*

El “*Mateno*”

*Mi pacienciĝas — neŝancela
Eĉ tercolon ne paŝante kankra.
Materie, vere, tre mizera
Sed morale — firmecela.*

El “*Kvar Monatojn Jam!*”

En poemoj pri vojaĝo sub polica eskorto, ni legas jenajn versojn:

*La blanka eklumeto turniĝas jam en ruĝaŭ-
roron . . .
Kaj tuj per unu fojo balaas ĉian noktmedion.
Varmeto al la ter’ kaj ĉiel’ ekdonas sian blo-
von,
Subite sentas la vojaĝant’ la flaman poezion.*

El “*Translokate, en Frumateno . . .*”

Revoluciistoj ĉiam rigardas la tiranadon kaj persekuton fare de reakciuloj kiel necesan hardadon por sia revolucia volo. En sia poemo *La Kanto pri l’ Pistita Rizo*, Prezidanto Ho skribis:

*Suferas la rizgreno sub la bato rizpistila
Sed pasis la elprovo, miros vi pro l’ blanko
brila!
Similaj estas homestaĵoj en ĉi-monda vivo
Por iĝi hom’, necesas la pistil’ de malfeliĉo.*

En sia *Memkonsilo*, li diris pli klare:

*Nun trafas vin malbeno la plej kruda
L’ animo plu hardiĝas je fera tremp’.*

Tia sinteno estas revolucia eltenemo kaj revolucia optimismo. Tiaj poemoj certe povas kuraĝigi homojn malestimi ĉiujn mallumajn fortojn kaj pliigi ilian batalvolon por venki la malamikojn. Granda gvidanto devenas de granda popolo, kaj lia spirito siavice certe donas grandan kuraĝigon al la popolo. La granda popolo kun tia granda gvidanto estas netimigebla nek subpremebla.

Kvankam lia menso estas super la prono de la prizono, kvankam li loĝis tie ĉiam “skrutante la liber-ĉielon tra l’ ferkrado” kaj ĉiam bedaŭris “iom ajn servi ne povante sur batalkamp’”, tamen, Prezidanto Ho tiam ne ignoris la realon nek malstreĉis la aktualajn batalojn en la karcero. La poemaro

konsistas grandparte el priskriboj pri aferoj en la prizono, kiuj profunde esprimas la klasan sentimenton de la aŭtoro tute klaran en amo kaj malamo. En la versaĵoj, li akre malkovris la dekadencan kaj tiranadon de reakciuloj, dum li montris sinceran simpatian kaj zorgon al la suferantaj samsortuloj.

La poemoj de Prezidanto Ho estas skribitaj laŭ klasika stilo, sed en lingvaĵo nuntempa de la amasoj, kiu estas simpla, senornama, kvazaŭ senpene improviza, tamen plena de ĉarmo. Tiuj karakterizaĵoj devenas, laŭ nia opinio, de la vivstilo de Prezidanto Ho, kiu kutimiĝis al mizero kaj simpleco. En la celebra soleno de la 15-a datreveno de la fondiĝo de la Vjetnama Demokratia Respubliko en 1960, mi havis la honoron plurfoje vidi Prezidanton Ho. Kaj lia simpleco, senpedanteco kaj modesteco ĝis nun ankoraŭ profunde gravuriĝis en nia memoro. Dum la ŝtata festeno, Prezidanto Ho kun entuziasma humoro direktis persone la komunan kantadon de revolucia kanto. Jam kun alta aĝo de 70 jaroj, li tamen estis plena de revolucia juneco — tia ja estis Prezidanto Ho.

Prezidanto Ho diris ke “neniam igas min la versoj tre pasia”, tamen, pri la poemoverkado, li eldiris en la poemo *Legante la “Antologion de Mil Poetoj”* sian opinion, kiu estas tre trafa kaj profunda, kiel jene:

*Al iamaj poetoj plaĉis kantoj al naturo:
Riveroj, montoj, fumo, neĝ’ kaj floroj, lun’
kaj vento.
Hodiaŭ, venas versoj el la ŝtala elemento:
Ĉar ankaŭ la poeto devas lukti por futuro.*

“Hodiaŭ, venas versoj el la ŝtala elemento”, tio ĉi ĝuste estas la vidpunkto pri literaturo kaj arto nepre havenda por revoluciaj literaturistoj kaj artistoj. La poemoj de Prezidanto Ho mem estas tiaj el la ŝtala elemento, kiu entenas tre utilan direktivon kaj ekzempligon por tiuj kiuj volas verki socialismajn versaĵojn. Tial, ignorante mian senkompetentecon, mi skribas jenan kvarverson dediĉe al la poemaron *Tagkajero en Prizono*, por esprimi mian altan estimon al Prezidanto Ho.

*Arda indigno balaas la teron per brulo;
Spiroj popolaj sin turnas impete en venton.
En la versaro tintsonas la ŝtalelementoj;
Konu l’ akrecon de l’ glavoj la reakciuloj!*

* La libro *Tagkajero en Prizono* estas jam esperantigita de Dao Anh Kha kaj eldonita de la Fremdlingva Eldonejo de la Vjetnama Demokratia Respubliko, 1966. Ĉiuj cititaj versoj en ĉi tiu artikolo estas el la nomita esperanta traduko.

Al Niaj Abonantoj

Karaj legantoj,

Tuj venos la jaro 1974, la abonperiodo de multaj el niaj abonantoj finiĝas kun tiu ĉi numero. Por eviti mankon de unuopaj numeroj de la jarkolekto, ni sincere petas ke tiuj legantoj bonvolu ĝustatempe renovigi sian abonon por la venonta jaro, ĉar ni ne povas garantii plenumon de livero de malnovaj numeroj, precipe kiam multaj tion petas.

Krome, ni atentigas vin ke sur la adreslipo gluita sur la koverto de nia gazeto la abonperiodo de la adresito estas indikita. Tie vi trovos indikon, ekzemple "1-12/73 aŭ "10/73-9/74", tio signifas ke la periodo de abono validas "de numero 1 ĝis numero 12, 1973" aŭ "de numero 10, 1973 ĝis numero 9, 1974" respektive. El tio vi povas facile trovi, kiam vi devas renovigi vian abonon por kontinue ricevi nian gazeton.

Por aboni aŭ renovigi la abonon, vi povas turni vin al niaj lokaj perantoj aŭ rekte al ni, kun pago kaj indiko de la adreso, abonperiodo, numero de komenciĝo kaj nombro de ekzempleroj.

Niaj legantoj estas petataj plie varbi novajn abonantojn por ni. Tio multe kontribuos al la interkompreniĝo kaj amikiĝo inter diversaj popoloj kaj al progresigo de nia gazeto. Se la abonilo de novaj varbitoj estos sendata al nia peranto, bonvolu peti lin noti la nomon de la varbinto, por ke ni povu sendi al tiu ian donacon kiel esprimon de nia dankemo.

Kun antaŭdanko ni sendas plej koran saluton kaj deziras al vi feliĉan novan jaron.

**Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo,
P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio.**

Intervidiĝo kun Aŭstralia kaj Itala Esperantistoj

En septembro kaj oktobro de 1973, aŭstralia esperantisto S-ro Harold Marshall kaj itala esperantisto S-ro Pierino Luoni vizitis Ĉinion.

Dum sia restado en Pekino, ili intervidiĝis unu post la alia kun laborantoj de la redakcio de EPC kaj la Libroservo de ĈEL, kaj la konversacio iris en amikeca

kaj varma atmosfero. Ambaŭ gastoj elmetis valorajn opiniojn pri la enhavo de EPC kaj S-ro Harold Marshall konigis al la ĉinaj esperantistoj la esperantan movadon en sia lando.

Ilia vizito faris kontribuon por pliigi la amikecon inter la popoloj kaj esperantistoj de Ĉinio kaj tiuj du landoj.

Sur la Kovrilo:

Laboristaj, kamparanaj kaj soldataj studentinoj de la Centra Instituto por Naciecoj en amuza kunveno en parko

Sur la Dorskovrilo:

Prezentado de infanoj

KOREKTO

En la "Dokumentoj de la Deko Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio" oni legu "marto de 1971" anstataŭ "marto de 1970" sur pĝ. 2, dekstra k. l. 22.



EL POPOLA ĈINIO 人民中國報


Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO
P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 12 (185) 1973

Ĉefa Enhavo


Venka antaŭenmarŝo sub la kuraĝigo de la spirito de la Deko Kongreso de la Partio	1
Vizito al la Tangŝan-a Ŝtala Fabriko	8
Ŝanĝiĝo de malnova petrolrafinejo	11
Venka batalo kontraŭ sekegeco	14
Rakontoj pri tibetana kompartiano Ĉelog	19
Dongfeng-bazaro de Pekino	21
Veterana ruĝarmeano kaj sia kamparanino-filino ...	25
Suĝoŭ-a brodarto	30
Speciala kudromaŝino	32
Verda dezerto	33
Venka fermiĝo de la Kvara Konferenco de Ŝtataj kaj Registraraj Ĉefoj de Nealiancitaj Landoj	40
Pri la "Tagkajero en Prizono", poemaro verkita de Prezidanto Ho Chi Minh	45


Lejgou Konsulo



Marborda patrolado

Ĝangiang-haveno, unu el la gravaj havenoj de Ĉinio






Lejĝou-duoninsulo estas unu el la ĉefaj produktejoj de suker-kanoj de Ĉinio.

Hodi-akvrezervejo, konsistiga parto de la Junula Kanalo sur Lejĝou-duoninsulo.



Post la Liberiĝo, 1,400,000 muoj da tero estas forstumitaj sur Lejĝou-duoninsulo.





Bona specio de rizo kulturita de sciencia grupo





Nova fiŝista vilaĝo





Blanklipa Cervo

Veninte al la cervobredejo en la Pekina Zoologia Ĝardeno, vi povas vidi viglajn cervojn senĝene promenantajn. Krom japanaj cervoj, ruĝaj cervoj kaj rangiferoj, vi povas vidi ankaŭ rarajn blanklipajn cervojn (*cervus albirostris*) kun relative granda flave bruna korpo, longaj mallarĝaj oreloj, mallonga vosteto kaj pure blankaj haroj ambaŭflanke de la nazo kaj sur la malsupra lipo.

La blanklipaj cervoj vivas en arbaroj kaj arbustaroj sur altaj montoj de la Kinghaj-Tibeta Altebenejo, Gansu, Siĉuan, Junnan kaj aliaj lokoj de Nordokcidenta Ĉinio. La dika tavolo de malmolaj haroj sur ĝia korpo ĝin protektas de frosto kaj ĝiaj grandaj hufoj ebligas al ĝi galopadi sur altaj montoj, tiel ke estas malfacile kapti ĝin. Ĝi ŝatas vivi en grupo. Por serĉi manĝaĵon kaj akvon post neĝblovado en vintro, blanklipaj cervoj ofte faras longan vojaĝon en grupoj kondukate de cervoviro. Post la Liberigo, ĉasado de tiu rara kaj valora animalo estas malpermesata de nia ŝtato.

